Speciala eldono Universala Kongreso, Bjalistoko, Pollando, julio 2009

**La subpremata memoro de la Okcidento – Geopolitiko de agitado – Apero de „pirata povo”
Eŭropo, identeco, krizo, solvo? – Puĉo en Honduro – La Okcidento ...**

LE MONDE
diplomatique en Esperanto

Julio 2009 Papera eldono de *Le Monde diplomatique en Esperanto* http://eo.mondediplo.com kaj de la *Monda Asembleo Socia (MAS)* http://mas-eo.org 8 paĝoj 2,50 €

La unuaj paŝoj de s-ro Obama

ANDRES COMPAGNUCCI. – « Celui qui est différent » (2007)
„Tiu kiu malsamas”

POR ALFRONTI la heredaĵon de siaj antaŭuloj, la nova prezidanto de Usono rifuzis multajn iliajn ideojn. Certe, s-ro Barack Obama ne akcelis la retiron el Irako de la usonaj trupoj, kaj li sendis kromajn soldatojn al Afganio en mortigan militon seneliran. Interne, lia politiko pri la aŭtomobilindustrio, bankoj, pago al gvidantoj ne rompas kun la nekrevema „liberalismo”, kiu socialigas nur la perdojn de la entreprenoj. Tamen, s-ro Obama reprezentas sendube tion kion la usona sistemo povas produkti kiel plej progreseman en la nuna momento. Tiom ke la decidoj de la vaŝingtonaj gvidantoj ŝajnas kelkfoje preferindaj al tiuj de iliaj kolegoj de Parizo, Bruselo, Moskvo, Pekino aŭ ... Teherano. Se la decidemo de la Blanka Domo ne fleksiĝas kaj se iuj premgrupoj kiuj influas la Kongreson por la kvardek-ses milionoj da usonanoj sen ia ajn asekuro. Tio ne estas nenio.

Eblas kontraŭargumenti ke s-ro Obama estas demokrato, finfine. Tio signifus ignori kvardek jarojn da historio. Ĉar ekde la alveno de la respublikano Richard Nixon en la Blankan Domon, en 1969, la du demokrataj prezidantoj kiuj sekvis ja bone parolis pri rompo, sed ... kun la ortodokseco, iliaopinie tro progresema, de sia partio. Ambaŭ tiel preparis la terenon por la respublikanoj kiuj sekvis al ili (Ronald Reagan kaj s-ro George W. Bush). S-ro James Carter malfermis la balon de malreguladoj, subtenis politikon ultramonisman kaj, sub kovro de „defendo de la homrajtoj”, relanĉis la malvarman militon. Kun s-ro William Clinton tio estis ankoraŭ pli malbona: akrigo de la punoj, ĝeneraligo de la mortpuno, nuligo de la federacia helpo al malriĉuloj, lanĉo de militoperacioj en Afganio, en Irako, en Sudano, en Kosovo, sen mandato de la Unuiĝintaj Nacioj. Oni devas aprezi la komencan bilancon de s-ro Obama ankaŭ laŭ tiu mezurilo.

Lia parolado en Kairo, la 4-an de junio 2009, alportas nenion vere novan, koncerne la esencon: s-ro George W. Bush jam koncedis la ideon de palestina ŝtato kaj, post s-ro Carter, ĉiuj prezidantoj de Usono postulis – kun la konata rezulto – la haltigon de la israela koloniado. La tono tamen ŝanĝiĝis komplete. Deziranta „rompi la ciklon de suspekto kaj de malakordo” inter Usono kaj la popoloj de Proksimoriento, s-ro Obama zorge evitis la uzadon de la adjektivo „terorista”, tiom kara al lia antaŭulo. Parolante pri la Hamaso, la usona prezidanto eĉ koncedis ke tiu organizaĵo „disponas pri apogo ĉe certaj palestinanoj”. Fine, proponante al tiuj inspiriĝi el la bataloj (ne perfortaj) de la usonaj nigruloj, li implicite asimilis la israelan koloniadon al la „humiligo de rasdisigo” antaŭe spertita de la nigruloj de Usono.

TAMEN, ALDONIS li, *„Usono ne pretendas scii kio estas plej bona por ĉiuj”*. Tiom saĝa principo estis tuj aplikita al Irano. En sia parolado de Kairo, s-ro Obama bedaŭris la ŝtatrenverson aranĝitan kontraŭ Mohamad Mosadeg fare de la usonaj sekretaj servoj en 1953: *„Meze de la malvarma milito, Usono ludis rolon en la renverso de la irana registaro demokratie elektita.”* Tio jam esprimis ke ĝi ne estas en ideala situacio por riproĉi la urnomanipulistojn, ĉefe se tiuj atendas nur tion por povi atribui al siaj malbonŝancaj konkurantoj, hieraŭ pilieroj de la teokratia reĝimo, esti transformiĝintaj al dungosoldatoj de la Granda Diablo. Sed ju pli la irana situacio akriĝas, des pli la komenca preteco de la Blanka Domo intertrakti kun Teherano elmetos ĝin al la mokoj de novkonservativa dekstro, kiu siavice neniam senarmiĝos.

La usonaj strategiaj interesoj restas eksterordinare trudaj por ia ajn prezidanto de Usono, kiu devas, vole aŭ ne, ludi la rolon de imperiestro. La unuaj paŝoj de s-ro Obama tamen supozigas ke li ankoraŭ ne tute forgesis sian progreseman pasintecon en la malriĉaj kvartaloj de Ĉikago.

Serge HALIMI.

En tiu ĉi numero

Serge Halimi: La unua paŝoj de s-ro Obama (ĉefartikolo), p. 1

Jean-Guy Allard: La usona ambasadoro en Honduro – elokventaj faktoj, p. 1 kaj 8

Akram Belkaid: Identecaj kontraŭdiroj de Eŭropo – De Mozarto ĝis Hitlero, kio okazis? p. 2

Vilhelmo Lutermano: Puĉo en Honduro, p. 2

Frédéric Lordon: Kiam la financa krizo montras tiun de la komuna projekto – Fino de la tutmondigo, ĉu komenco de Eŭropo? p. 3

Alain Gresh: Nedetruebla revo pri pli bona mondo, p. 3

Maurice Lemoine: Reveno de la „goriloj” en Honduro, p. 4

Philippe Rivière: Apero de la pirata povo, p. 6

Alain Gresh: La subpremata memoro de la Okcidento, p. 7

Aranĝoj de la verduloj, p. 8

Eldonindikoj, MAS-eldonoj kaj diversaĵoj, p. 8

Impresoj pri la puĉo en Honduro, p. 8

La usona ambasadoro en Honduro: elokventaj faktoj

de Jean-Guy ALLARD

HUGO LLORENS, la ambasadoro de Usono en Honduro, kiu konfesis esti partopreninta en kunvenoj kie oni diskutis pri la puĉplanoj antaŭ la forrabo de la prezidanto Zelaya, estas kuba usonano elmigrinta al Miamo dum la operacio *Peter Pan* de la CIA.

Specialisto pri terorismo, li estis la direktoro de la Andaj Aferoj ĉe la Nacia Konsilantaro pri Sekureco en Vaŝingtono kiam okazis la ŝtatrenverso kontraŭ la prezidanto Hugo Chávez. Dum siaj unuaj jaroj de diplomatia aktiveco, li instaliĝis por la unua fojo en Honduro kiel ekonomia konsilisto, poste pasis al La-Pazo en Bolivio, kun la sama titolo. Li daŭrigis sian vojon, ĉi-foje kiel komerca konsilisto en la Paragvajo de la diktatoreco de Stroesner kaj li aperis poste en Salvadoro kiel kunordiganto pri fidrogo, alia el liaj specialaĵoj.

Farante neatenditan salton al la alia flanko de la planedo, la tre multflanka Llorens iris poste al la Filipinoj kiel simpla konsula oficisto. Liaj aktivecoj ebligis al li tiam lerni ... la tagalogan, la lokan lingvon, kiun li parolas flue.

Revene sur la amerika kontinento, li estis dum tri jaroj ĝenerala konsulo de Usono en Vankuvero, Kanado, kie li dediĉis sin al starigo de stacio nomata multagenteja, kiu kunigis, en la ĉambroj de la konsulejo, reprezentantojn de la FBI, de la Oficejo pri alkoholoj, tabako kaj pafarmiloj, kaj de la doganservo de Usono. Sen forgesi la Sekretan kaj Sekurecan servon de la ŝtatdepartemento. Ĉio ĉi sub la temo de batalo kontraŭ la terorismo kaj la internacia deliktado.

Flanke de Elliot Abrams kaj Otto Reich

LA BLANKA Domo de George W. Bush rekrutis la lertan Llorens en 2002 kiel direktoron de *Andaj Aferoj de la Nacia Konsilantaro pri Sekureco* en Vaŝingtono, D.C., kio faris lin la ĉefa konsilisto de la prezidanto pri Venezuelo.

Estas klare ke la ŝtatrenverso de 2002 kontraŭ la prezidanto Hugo Chávez okazis dum Llorens troviĝis sub la aŭtoritato de la ŝtat-subsekretario pri Hemisferaj Aferoj Otto Reich, kaj de la tre kontestita Elliot Abrams.

Kuba usonano kiel li, Reich, protektanto de la terorista ĉefo Orlando Bosch, estis dum tri jaroj ambasadoro de Usono en Venezuelo, inter 1986 kaj 1989, kaj asertis koni la terenon.

Elde la ŝtatdepartemento, Otto Reich donis sian tujan apogon al la venezuela Micheletti, Pedro „La Kurta” Carmona, kaj al la venezuelaj puĉistaj militistoj.

daŭrigo en paĝo 8

IDENTECAJ KONTRAŬDIROJ DE EŬROPO
De Mozarto ĝis Hitlero, kio okazis?

de Akram BELKAID

ĈU LA OKCIDENTO ekzistas? Almenaŭ tia kian vidas ĝin la precipaj eŭropaj kaj usonaj retorikoj? En la daŭrigo de la laboroj kiuj kondukis lin okupiĝi pri la religia demando de la 21-a jarcento, la libana ekonomikisto kaj historiisto Georges Corm malmuntas tiun nocion kiu servas tro ofte por difini hermetikan disig-linion inter tio kio estus „referenca" civilizacio kaj la aliaj, juĝataj laŭ senĉese postulata ekzempleco.[1] Ekzempleco kiu, cetere, nutras pseŭdan „konflikton de civilizacioj" inter *„mita Okcidento nomata «juda-kristana» kaj Oriento, ne malpli mita, nomata «araba-islama»*. Por la aŭtoro, *„la nocio Okcidento estas tamen ne pli ol kava koncepto, ekskluzive geopolitika"*, kies graveco estas, interalie, ĉefe la rezulto de la intensa uzado de tiu termino fare de Usono dum la malvarma milito.

Elirante el tiu konstato, facilas konscii pri tio kion oni povus kvalifiki kiel identeca kontraŭdiro de Eŭropo. Tiu ĉi, laŭ Corm, havas nenian parencecon kun la nuna nocio de Okcidento, laŭ sia kulturo, sia kreemo, sia inventemo, sia arto, sia rafinemo, sia sciemo pri la mondo kaj sia filozofia pensado. Estas cetere la granda merito de tiu verko ke ĝi revenas al la impresa produktado, dum la jarcentoj, de la filozofiaj kaj metafizikaj ideoj kaj retorikoj sur la Malnova Kontinento. Produktado kiu, kompreneble, ne estis ĉiam je la alteco de la idealoj defendataj de la eŭropanoj – la aŭtoro prave emfazas la *„paralelismon inter la perfortoj kiujn la eŭropanoj faris al si kaj kiujn ili faris al la aliaj popoloj"*.

Tamen, la reinterpretado de la eŭropa historio fare de Corm havas nenion por fari kun iu plia pamfleto. Nek eŭropama nek eŭropmalama, tiu libro estas antaŭ ĉio enketo kiu demonstras kiel la mito de Okcidento naskiĝis, kaj tio ne estas la malplej granda paradokso, dum la 19-a jarcento romantika. Jarcento kontraŭ la klerismo, kiu kondukis al la plej granda fio kun la akriĝo de la kontraŭjudismo, antaŭludo al la gentekstermo de la judoj fare de la nazioj de la 20-a jarcento. Tion memorigas tri ĉapitroj, de kiuj unu, kiu titoliĝas „De Mozarto ĝis Hitlero, kio okazis?", memorigas ke Eŭropo estis ofte kapabla je la plej granda bono antaŭ ol droni en la turmento.

KAJ LA PLEJ granda danĝero de nia epoko konsistas en la fakto ke tiu sama Eŭropo, tentata de dogma okcidentismo, refalas en siajn pasintajn erarojn, tiujn samajn kiuj kondukis ĝin fajfi pri la universalismo kiun ĝi ĉiam deklaris sia. Kaj ĝuste en tiu senco la verko de Amin Maaluf[2] eĥas al tiu de Corm. Tiu libana romanverkisto kaj eseisto ankaŭ adiaŭas la „konflikton de la civilizacioj" kaj liveras klarvidan kaj zorgigan analizon pri la realeco de la mondo. Monde malreguligita, morale elĉerpita, kie la Okcidento, komprenata en la larĝa senco, forgesis siajn valorojn kaj reduktis la universalismon al simpla slogano, dum la araba mondo ne sukcesas eliri el la sakstrato ĉefe ideologia. La tezo de „malregulado de la mondo", pro elĉerpiĝo, interalie morala, de la civilizacioj, montras la urĝecon de refondado kie Eŭropo repacigita kun siaj propraj valoroj kaj liberigita de la okcidentisma trudiĝo povus denove ludi antaŭmovan rolon, kiel iam en la jarcento de klereco.

Akram BELKAID.

1. Georges Corm, *L'Europe et le mythe de l'Occident. La construction d'une histoire [Eŭropo kaj la mito de Okcidento. La konstruado de historio]*, La Découverte, Parizo, 2009, 320 paĝoj, 23 eŭroj.
2. Amin Maalouf, *Le Dérèglement du monde [La deregulado de la mondo]*, Grasset, Parizo, 2009, 315 paĝoj, 18 eŭroj.

Puĉo en Honduro

de Vilhelmo LUTERMANO

Jen situacio kiu, en Honduro, centramerika lando, koncernas certe ne „nur" ties loĝantaron. Ŝajnas ke la vico da tiaj provoj, de la fiaskigita ŝtatrenverso en Venezuelo, la 11-an de aprilo 2004, la posta petrolbatalo tie, tra la provoj dispecigi Bolivion, ĝis la nuna puĉo en Honduro, montras ke la latinamerikaj oligarĥoj kune kun la usonaj dekstruloj ne ĉesas agi por restarigi la „perditan paradizon", nome la ekspluatadon per fera mano, prefere dikatora, eĉ se sanga.

La rolo de Usono, ĝis antaŭ nelonge regula apoganto kaj eĉ instiganto de tiaj puĉoj favore al la oligarĥio de la koncerna lando, intertempe ŝajne ŝanĝiĝis kun la nova prezidanto Obama. Sed: li estas la prezidanto de sia lando, la povon li devas dividi kun la mastraro kaj kun la ekzistantaj strukturoj grandparte trempitaj de imperiismaj ideoj kaj realaĵoj. Kiu difinas la naciajn interesojn de Usono? Jes, Obama, sed ne nur li kaj lia skipo. Ĉu la pozicio de Obama estas vere multe pli firma ol tiu de Zelaya?

La armea puĉo en Honduro metas Obama-n antaŭ tute novaj decidoj: ĉu aktive subteni la progreseman registaron de la laŭleĝa hondura prezidanto, aŭ sekvi la ĝisnunan kurson de subteno al la oligarĥio. Li deklaras pli-malpli la unuan, sed vole nevole lasas fari la alian, laŭ la realaj fortrilatoj. En Honduro, Usono havas daŭre militbazon, cetere kontraŭan al la hondura konstitucio; kial? kun kiu celo? ĉu kun la samaj kiel antaŭe?[1] Denove zorgigaj demandoj, des pli ke la reakciularo en Honduro kaj en Usono serĉas nur okazojn kaj pretekstojn por senigi sin je tiu „plago" kiu furiozas en tuta Ameriko, kiu disvolvas sistemojn de sano kaj de edukado por la simpla popolo anstataŭ grandigi ankoraŭ pli facile la trezorojn de la riĉularo. Ili komplotas kaj agas kune – en Honduro kaj cetera Latinameriko kiel ankaŭ (aŭ eble eĉ ĉefe?) en Usono, al kies prezidanto ili certe deziras prepari sorton similan al tiu de lia hondura kolego[2] ...

Vilhelmo LUTERMANO.

1 Vidu pri tio artikolon de Eva Golinger: Usona militbazo kaj la puĉo en Honduro http://mas-eo.org/article365.html.

2 Vd Maurice Lemoine: Reveno de la „goriloj" en Honduro, p. 4; vd ankaŭ Jean-Guy Allard: „Bushisma" flanko subtenas puĉon en Honduro, http://mas-eo.org/article362.html

KIAM LA FINANCA KRIZO MONTRAS TIUN DE LA KOMUNUMA PROJEKTO
Fino de la tutmondigo, ĉu komenco de Eŭropo?

La elekto de la Eŭropa Parlamento okazas, dum la juraj pilieroj de la Unio, unu post la alia, ŝanceliĝas sub la trafo de la ekonomia krizo. En aprilo, la Eŭropa Centra Banko eĉ cedis al la plej alta herezo: adopti politikon kiu signifas turni la monpresilon. Ĉu tiuj malreguladoj ne estas la okazo por radikale repensi la eŭropan projekton? Promeneto tra la historio instigas al tio.

de Frédéric LORDON

LA PARTIZANOJ de la ekonomia tutmondigo, kiu nenion tiom abomenas kiom la politikon, perfekte komprenis ke alvoki la mondan registaron estas la plej certa rimedo por havi pacon – komprenu: nenian registaron. Sama melodio, kvankam iomete malpli laŭta, sonas flanke de la ekonomistoj subite indignitaj de la „eksceso" de la liberalismo kaj kiuj nun ĵuras jam nur je tutmonda kunordigado. Jes! ni kunordigu planedskale – kompreneble tio postulas iom da tempo ... Tiel la alvoko de la grandaj mondaj horizontoj servas senŝanĝe kiel preteksto por ĉiaj hipokritecoj de la senfine prokrastita ago kaj por ĉiuj strategioj de eterna bedaŭro.

Sekvi la revon de politika tutmondigo, kiu fine kompletigus kaj stabiligus la ekonomian tutmondigon, ĉefe per tio ke oni donus al ĝi ĝiajn „bonajn" reguligajn instituciojn, tio signifas ne vidi la kondiĉojn de ilia starigo kaj ankaŭ ilian „efikecon", ne en la senco de ekonomia efikeco, sed en la senco de la politika kapablo de tiuj institucioj trudi vere siajn normojn. Ne superfluas observi ke la kapitalismoj historie evoluis interne de naciaj kadroj. Ne povis esti alie : ekzistas procedo de iom grava instituciigo nur se ĝi estas apogata de adekvata forto, do sur la bazo de aŭtenta komunumo politike konstituita. Sed kie estas la monda ŝtato kiu povus pretendi disponi je tia forto ? Nenie, pro la simpla kialo ke ne ekzistas aŭtenta monda politika komunumo, do soci-monda korpo kiu estus lastanalize depoziciinstanco de la forto kiun la ŝtatoj alproprigas al si per kaptado.

Se la instituciigo de regulado de la kapitalismo supozigas ke oni renkontigas la ekonomian nivelon de la merkatoj kun tiu, politika, de la instituciaj konstruadoj, tiam temas do pri „malsuprigo" de la unua, sed tamen sen ke estu malpermesite „suprigi" la duan. El tiu vidpunkto, la regiona skalo forte trudiĝas kiel la nova teritoria nivelo sur kiu eblas intensigi politikajn eksperimentojn kiuj okazas kvankam ankoraŭ ne tre disvolvitaj.

Eŭropo troviĝas paradokse en la plej bona kaj la plej malbona stato inter ĉiuj mondregionoj. Ne estas diskuteble ke ĝi estas la plej avancinta en la procedo de institucia integrado. Sed la nuna skuo, kiel ofte la krizoj, ĝuas senkompatajn rivelajn ecojn, en preskaŭ fotografa senco de la vorto, kaj pretiĝas grandskale elmontri la misojn de la eŭropa konstruado. De longa tempo – fakte ekde la komenco – bone videblaj ... por tiuj kiuj volis vidi ilin *(vidu* François Denord kaj Antoine Schwartz : „Ekde la 1950-aj jaroj, odoro de reakcio", *Le Monde diplomatique en Esperanto*, junio 2009), tiuj misoj estis fine ĉiam kovritaj de la kutimaj neadoj, ebligitaj de la „malalta" intenseco de la socialaj detruadoj kiuj fariĝis ia „konstanta dieto" kaj por tiel diri kunfanditaj en la ĉiutagan ordinaran pejzaĝon. Sed la eksterordinareco kaj la perforto de la krizopinto ridindigas la kutimajn strategiojn prezenti ilin minimumaj, alvoki al necesaj „klopodoj" kaj al pacienco, „kio pagos ĉion". Jen prezentiĝas politika okazo kian la historio tre malofte servas. Ĉar tio, kio estis nepensebla en trankvila tempo, jen fariĝas ebla en la ŝtormo: detrui tiun Eŭropon. Por refari alian.

Nepraj necesoj rande de la abismo

ĈU VERE NECESOS detrui ĝin ? Plurrilate oni povus esti tentata pensi ke ĝi estas jam mortinta. Ĝi simple ankoraŭ ne scias tion. Ŝajnas tamen ke ĝia enkarniĝo, la Eŭropa Komisiono, faras mem ĉion por ĝi eblan por urĝi tiun finan rivelon. En ia apoteozo de doktrina stulteco kaj kun nesuperebla sento pri la historia momento, sino Neelie Kroes, komisara gardisto de la reguloj de konkurenco, ne hezitis en aŭtuno 2008 interveni en la grandan debaton pri la financkrizo por indiki ke la injektoj de sume 10,5 miliardoj da eŭroj deciditaj de la franca ŝtato por rekapitaligi ses bankojn (BNP Paribas, Crédit agricole, Banques populaires, Crédit mutuel, Société générale, Dexia) estas kontraŭleĝaj laŭ la sanktaj leĝoj de la libera kaj sendifekta konkurenco.[1]

Oni devas ja koncedi al ŝi ke, sur la papero kaj el tute formala vidpunkto, ŝi ne tute malpravis. Ekzistas ja fakte en tiu adorinda Lisbona Traktato artikolo 107 kiu malpermesas la helpojn de ŝtato. Envere, tiu artikolo ne estas la sola spertanta la plej akrajn ofendojn en tiu epoko de ĉiu-saviĝu-ĉio-disfalos. Estas fakto ke la nepraj necesoj rande de la abismo ne lasis al la eŭropaj registaroj alian elekton ol piedpremi la dogmojn. Estis do pli bone ne tro etendiĝi pri tiuj malregulecoj kaj esperi ke, kun la fino de la plej granda parto de la krizo, kaj helpe de kelkaj efikoj de memorperdo, ĉio revenos en la ordon de la eŭropaj leĝoj dum kelkaj momentoj suspenditaj.

Tamen oni rigardu ne tro precize, ĉar, el vidpunkto de ĝiaj plej fundamentaj dispozicioj pri ekonomio, la traktato ektroviĝas en stato simila al tiu de kuraĝa urba herba ludejo iun pluveman dimanĉon post rugbi-ludo. La artikolo 123, kiu malpermesas al la Eŭropa Centra Banko prunti *„al centraj administrejoj, al regionaj aŭ lokaj institucioj, al aliaj publikaj institucioj de la membroŝtatoj"*, ne retenis ĝin malfermi krediton de 5 miliardoj da eŭroj al registaro, hungara en tiu kazo, kiu krome estas eĉ ne membro de la eŭrozono!

Estas ankaŭ la artikoloj 101 kaj 102, kiuj, jen ree la konkurenco, malpermesas la formiĝon de dominantaj pozicioj kaj servas pli ĝenerale por malinstigi operaciojn de koncentrado, videble ne faris la plej etan obstaklon al la moviĝoj de banka restrukturado, cetere subtenataj de la ŝtatoj kiuj vidis en tio nur la okazon por iomete ŝpari la publikajn financojn per tio ke ili organizis la aĉetojn de la bankoj plej malfortaj fare de tiuj kiuj estis iom malpli tiaj. Aĉeto, en ŝtorma disputo, de Fortis fare de BNP Paribas, de Halifax – Bank of Scotland (HBOS) fare de Lloyds TSB, de Landesbank Baden-Württemberg (LBBW) fare de la regiona banko de Bavario, de la Dresdner Bank fare de la Commerzbank, la „solidigo" de la sektoro spertis malavaran akceliĝon kiu videble rezignis ĉian eŭropan aprobon; oni ne dubu pri tio ke tiuj dosieroj en normalaj tempoj estus longe rigardataj per lupeo kaj, iuj el ili eble eĉ rifuzitaj.

Rimarkita surscenigo

JE IU MOMENTO, tro estas tro. Sino Kroes volas ja silenti kiam la bankoj ludas *Monopoly* sub ŝiaj fenestroj, sed oni ne povas postuli ke ŝi neu sin senfine; alie, kian sencon havus, kaj al kio servas esti komisaro pri konkuren-

co? Indas noti la okazon elektitan por elpaŝi: la artikolo 107, la helpoj de ŝtato. Ĉar, en la hierarĥio de abomenoj estas ĉiam la ŝtato kiu aperas unue. Oni piedpremas la artikolojn kontraŭ koncentriĝo, tiu estas certe tre malbona, sed, esceptokaze, s-ino Kroes povas argumenti ke temas pri tiu de la kapitalo : la privata sektoro scias kion ĝi faras, eĉ se kelkfoje necesas iom admoni ĝin.

Sed la ŝtato! Estas logike ke, inter ĉiuj fortaj rompoj de la eŭropa traktato, estas la helpoj de ŝtato kiuj puŝas la komisariinon al kolero – kaj al ŝia unua ribelo. Ve, la mondo estas malica, kaj la membroŝtatoj sendankaj. Ĉar la kontraŭatako ne atendis. Landoj ne aparte konataj pro amuziĝo per la konstruado de Eŭropo, kiel Germanio, Svedio, Belgio, sciigis al s-ino Kroes ke ŝi prefere silentu.

Sed, kvazaŭ por konfirmi tiun ideon de alvokiteco al la plej granda malbono, jen s-ro Joaquín Almunia, komisaro pri ekonomiaj kaj monaj aferoj, suriras la scenejon tre remarkite por memorigi ke, laŭ la artikolo 126 kaj de la stabilec-traktato, la publikaj deficitoj devas resti sub la limo de 3 %. Ĉio ĉi meze de la recesio de la jarcento. Oni serĉas konvinkajn bildojn kiuj helpus doni al si ideon pri la grado de deliro en kiun falas la Komisiono en tiu periodo: ĉu ambulanco haltigita de la polico ĉar ĝi ĵus pasis tra oranĝa lumo survoje al loko de akcidento? Ĉu aviadilo mankanta kerozenon al kiu oni malpermesas alteriĝi ĉar ĝi transportas iun jogurton kun pasinta konsumlimdato?

Kompreneble eblas kalkuli kun la senkondiĉaj kredantoj kiuj ripetas la gospelon, fidelaj al la marko „La voĉo de ĝia mastro”: la deficitoj kreskas, la publikaj ŝuldoj akumuliĝas. Ĉu ili kredas esti la solaj rimarkintaj tion? Pri tio ke la movo de astronomiaj sumoj el la registaraj buĝetoj havas la econ prepari salitan krizon de la publikaj financoj, ĉiuj maltrankviliĝas. Sed eĉ per plej simpla racieo oni normale preferas eblan postan krizon al tujan certan morton. Gajni tempon: jen certe la lasta ag-marĝeno kiu restas al la ŝtatoj por provi ĉirkaŭbari la katastrofon, kaj tio ne estas nenio: kelkfoje gajni tempon savas! En la sama momento, Usono, kiu scias videble pli bone ol la eŭropanoj kion signifas stari ĉerande de abismo, preparas *stimulus package* de 13 % de la malneta enlanda produkto. Serĉu la eraron ...

Oni devas ja koncedi, je malŝarĝo de tiuj kompatindaj komisaroj, ke tiu situacio ege malekvilibrigas la juran aspekton de la eŭropa konstruado. Artikoloj 101, 102, 107, 123, 126, tio komencas multi. Nu, se la ideologiistoj de tiu Eŭropo fajfas pri la intelekta kohero, la situacio de la juristoj estas alia, ĉar ili rilatas kun la kohero de la juro. Necesas tre rapide diri kio povas okazi kun la eŭropa juro en momento kiam la vivnepraj necesoj kondukas al tio ke oni gaje rompas ĝin. Ni povas diri tuj ke la ideo de „intermita juro” ne apartenas al tiuj kiuj vekas spontan preferon de la juristoj ...

Post kiam la krizo estos digestita post certa nombro da jaroj kaj kiam la aferoj reaktiviĝas, kiujn argumentojn la Komisiono kaj ĉefe la Justec-Kortumo de la Eŭropaj Komunumoj uzos por kontraŭi malbonŝancajn kandidatojn al banka kunfandiĝo en pli trankvila tempo, kiam tiuj memorigas la antaŭaĵojn de Fortis – BNP Paribas aŭ de HBOS – Lloyds TSB? Ĉar la tro forte „jurigitaj” instituciaj kontruaĵoj, kiel la Eŭropa Unio, estas tro malfortaj, ili permesas nur tre malgrandan fleksiĝemon kaj ĉiu provo fari paŝon ekster la markita vojo, eĉ pro urĝo en kriza situacio, kreas eblan juran problemon. Oni povus kontraŭdiri ke la juro ĝustigas la juron kaj ke novaj gvidlinioj fakte efikas por adaptado de la malnovaj. Tamen necesas submeti al pli kvalifikitaj juristoj la validecon, ne de la apero de novaj gvidlinioj, sed de portempaj kaj revokeblaj gvidlinioj, do porokazaj.

Sed, envere, kion diri pri artikoloj, kiuj estis tiom malbone elpensitaj kaj malagnoskendas ĉe la unua serioza krizo, alian ol ke necesas komplete reskribi ilin – kaj fakte multajn aliajn kun ili – ... kaj ke la nuna periodo donas por tio la eksterordinaran okazon? La franca registaro, se ĝi havus du groŝojn da historia sento, kaptus tiun senegalan eblecon por malfermi pozitivan politikan krizon, same brutalan kiel necesan, sed tolereblan kaj eĉ dezirindan, ĝuste ĉar ĝi ebligas refari en la „varmego” tion kio tiel longe montriĝis neebla en la „malvarmo” – eĉ ne per kelkaj tre laŭtaj „ne” ĉe ĉiuj referendumoj ... – do fine relanĉi la eŭropan konstruadon sur novaj bazoj.

Ke dekstra franca registaro retroviĝas kiel ebla protagonisto de tiu fortoprovo altigus la ĉarmon de la periodo. La ĉeesto de s-ro Nicolas Sarkozy ĉe la ŝtatpinto instigas evidente al moderigo de la anticipoj, ĉar oni konas la disojn inter liaj deklaroj kaj realigoj. Jen la politika dramo: se li havus la plej etan esperon, li metiĝus ĉi-flanken. Ĉar oni neniel iluziu pri la kapablo de la socialdemokratoj aperigi tian kontestadon. Ili rapidus por bari per siaj korpoj tian infamaĵon, ĉar en iliaj mensoj estas neinversigeble enskribita ke ataki *tiun* Eŭropon signifas ataki *Eŭropon*.

En sia nuna formo, la Unio aparte zorgas por kiom eble plej naŭzi, kelkfoje eĉ, sed en la silento de iliaj turmentitaj animoj, ĝis ĝiaj plej sinceraj defendantoj. Se ĝi volus akceli la tendencojn de naciaj fermiĝoj, ĝi ne kondutus alie. Se tio estas la ĉiutage pli verŝajna produkto de tiu delira aventuro, oni preskaŭ demandus sin ĉu, por la eŭropa ideo mem, ne dezirindus ke iun belan tagon la kampuloj – mi volas diri la „eŭropaj civitanoj” – iru surloken por diri vorton rekte al la grandaj malsanuloj kiuj faris tiun ĉi Eŭropon neriparebla.

Frédéric LORDON.

1. Temis tiam pri la unua parto de plano de „rekapitaligo” de totala sumo de 21 miliardoj da eŭroj. Kp ekzemple „Brussels blocks French bank bail-out”, *Financial Times*, Londono, 28-a de novembro 2008.

Nedetruebla revo pri pli bona mondo

de Alain Gresh

LA ETOSO ESTIS ruĝa.[1] Dum du jardekoj, de la montaroj de Latinameriko tra la nordafrikaj montoj ĝis la rizkampoj de Azio, unu sama uragano ŝajnis forblovi la malnovan kolonian ordon kaj la ekonomian superregadon de la Nordo. En 1956, kun homereca ridego, la egipta prezidanto Gamal Abdel Nasser anoncis la ŝtatigon de la Kompanio de la Suezkanalo. En Alĝerio, la felagoj leviĝis por ĉesigi la statuson de „franca departemento” trudita al la lando. Post sia triumfo en Havano, Ernesto Che Guevara, la „heroa gerilano”, iris al aliaj kontraŭimperiismaj bataloj, de Kongo ĝis Bolivio. En Hindoĉinio, la vjetnamia popolo rezistis al la masivaj bombadoj farataj de la „bastiono de la libera mondo”. En la malproksimaj montaroj de Dhofar de la araba duoninsulo, ribeluloj, sub la flago de marksismo-leninismo, liberigis la tribojn kaj la virinojn el miljara subpremo.

Eĉ en la koro de Eŭropo kaj de Usono, studentoj kaj laboristoj ribelis kontraŭ la malnova mondo nome de novigita socialismo. Ĉe sia kunveno en Alĝero en 1973, la gvidantoj de la nealiancitaj landoj anoncis sian volon starigi „novan internacian ekonomian ordon” bazitan sur la rehavigo de siaj naturriĉaĵoj, kaj la petrolŝtatoj donis la ekzemplon per ŝtatigo de la nafto. *„La tempoj estas ŝanĝiĝantaj”* (*The times they are a-changin*’), kantis Bob Dylan ...

Elektoj perceptataj kiel instrumento de superregado

APOGANTE SIN SUR la helpo de la USSR, tiuj movadoj ankaŭ forte diferenciĝis de ĝi, denuncante la burokratiĝon de la potenco en Moskvo, ĝian malmultan aktivismon, ĝian decidon pri „paca kunekzistado” kun Vaŝingtono, konsiderata kiel defendo de la tiama stato. Tamen, trans sia diverseco, ĉiuj deklaris sin revoluciaj. Ili volis renversi la malnovan socian ordon, internan kaj internacian, per ĉiaj rimedoj, inkluzive de armita forto aŭ per ŝtatrenverso. Pri la „burĝaj demokratioj” oni parolis fie, la elektoj estis perceptataj kiel instrumento de superregado por la subpremantoj.

La esencon de tiu epoko esprimis neniu pli bone ol Jean-Paul Sartre. En sia fama antaŭparolo de 1961[2] de la libro de Frantz Fanon „La damnitoj de la tero”[3], li skribis ke la perforto de la koloniito *„ne estas absurda ŝtormo nek la reviviĝo de sovaĝaj instinktoj, nek eĉ efiko de venĝemo: ĝi estas la homo mem kiu rekomponas sin.* (...) *La koloniito kuracas sin je la kolonia neŭrozo per tio ke li forpelas la kolonianton per armiloj”*. Kaj la filozofo aldonas ke tiu „filo de perforto” ĉerpas *„en ĝi ĉiumomente sian humanecon: ni estis homoj je liaj kostoj, li faras sin homo je la niaj. Alia homo: de pli bona kvalito”*.

Dudek jarojn, tridek jarojn poste, tiu retoriko fariĝis neaŭdebla, la plej eta espero de ŝanĝo de la socia ordo reduktita al totalismemo, la idealo de egaleco identigita kun la arĥipelago gulago. Oni vidis ĉie la triumfon de la mono kaj de la individuismo. Ni estis *„kondamnitaj vivi*, laŭ la formulo de la historiisto François Furet, *en la mondo kie ni vivas, ne revi plu pri «rava estonteco»”*. Kaj, se ni konservis malbonan konsciencon pro la persistanta mizero, ni povis engaĝi nin ĉe la ĉampionoj de la homhelpo pretaj helpi la viktimojn de katastrofoj, de militoj, de diktatorecoj, kiel hieraŭ la patronaj sinjorinoj konsolis la malriĉulojn kaj samtempe tenis ilin ŝirmataj kontraŭ la propagando de la „ruĝuloj”. La *French doctors* anstataŭis la Internaciajn Brigadojn, la karitato anstataŭis la solidarecon. Uzado de perforto, siavice estis komplete diskreditita, asociita al terorismo; nur la ŝtata perforto de la Okcidento konservis sian pravecon.

Kiel tia revolucio – ĉu prefere diri kontraŭrevolucio? – estis ebla en tiom mallonga tempo? Pluraj faktoroj kontribuis al tio. Anstataŭ esti por longa daŭro malfortigita pro sia malvenko en Hindoĉinio, Usono sukcesis releviĝon des pli impresan ke Sovetunio dronis en senfina politika, kultura kaj ideologia stagnado, kiun atestis, en 1968, la dispremo de la „Praga printempo” kaj de la espero je „socialismo kun homa vizaĝo”. Vaŝingtono, batalante ĉe ĉiaj frontoj, sukcesis trudi ekonomian ordon subtenatan de la mondaj financ-institucioj, fifamigi la „socialisman modelon”, elĉerpigi Sovetion en dubaj bataloj en Afganio aŭ en la vetarmado, certigi al si la kunlaboradon de la novaj elitoj devenaj el la kontraŭkolonia batalo.

Ĉar tiu kontraŭrevolucio estis ankaŭ naskita de elreviĝo same granda kiel la mesiaj atendoj je naskiĝo de „nova homo” kiun Sartre estis esperinta. Certe, Fanon, inter aliaj, estis avertinta kontraŭ la risko de „konfiskado” de la revolucio kaj estis denuncinta tiujn kiuj, sur sia nigra haŭto, portas blankan maskon. Sed la realo preterpasis liajn plej aĉajn premsonĝojn. La elitoj kiuj deklaris sin adeptoj de la „scienca socialismo”, de Etiopio tra Kongo-Brazavilo ĝis Angolo, senprobleme reklasis sin flanke de la liberala „burĝa demokratio” kondukis al demokratio kiu estis popola nur laŭ la nomo kaj kies sola „pravigo” estis la firma diktatoreco de la landoj aliancitaj kun la Okcidento, de Indonezio ĝis Zairio. La longa armita batalo estis kondukinta ne nur al la malvenko de la malamiko – kaj de ties multaj aliancanoj de la kleraj koloniaj tavoloj. Ĝi kontribuis ankaŭ silentigi ĉian disidentan voĉon: ĉia kritiko estis asimilita al perfido en tempo de milito.

En Alĝerio, la Fronto de Nacia Liberigo (FLN) komencis elimini ne nur la fortojn kiuj estis eksteraj de ĝi, sed ankaŭ ĉiujn oponantojn interne de la organizaĵo mem. Tiuj aŭtoritatecaj metodoj daŭris ankoraŭ longan tempon post la sendependiĝo. En Latinameriko, la starigo de sovaĝaj arme-diktatorecoj en la 1970-aj jaroj montris ke la „burĝa demokratio”, la „formalaj liberecoj” havis ankaŭ kelkajn avantaĝojn, kion la popoloj de Orienta Eŭropo jam suspektis.

La malapero de la USSR kaj de la „socialisma tendaro”, la triumfo de la liberalismo, la sendivida superregado de la Nordo super la internacia ordo, la uzado de elektoj pli aŭ malpli liberaj, de orienta Eŭropo tra Afriko ĝis Latinameriko, ŝajnis enkonduki novan eraon. La Celoj de la Miljariĝo por la Disvolvado, deciditaj de la Unuiĝintaj Nacioj en 2000, promesis reduktadon de la malriĉeco, pli larĝan aliron al edukado kaj al sano, egalecon de la seksoj.

En tiu nova kunteksto, la revoluciaj fortoj devis revizii sian retorikon, sian strategion, sian praktikon. Des pli ke la mitaro de la armita batalo („Krei du, tri ... multajn Vjetnamiojn”, lanĉis Che Guevara) enhavis ankaŭ abstraktan romantikismon. Nur post multaj internaj debatoj la Partio de la Vjetnamiaj Laboristoj, en Hanojo, decidis fine de 1963 respondi per la armita vojo, en la sudo de la lando, al la usona akrigo, konscia pri la prezo kiun ĝia popolo devos pagi post tia decido.[4]

Ĉar li pripensis la pasintan sperton, s-ro Nelson Mandela akceptis komenci dialogon kun la potenco en Sud-Afriko kaj favoris kompromison kiu garantiis sufiĉajn rajtojn por la blankuloj por eviti ilian eliron kiel okazis en Angolo, Mozambiko kaj ankaŭ, en tre malsamaj kondiĉoj, Alĝerio – kaj, ankaŭ, por respondi al la postuloj de la okcidentaj potencaj ŝtatoj, kiuj okupis

1 Chris Marker, *Le fond de l’air est rouge*, dokumentfilmo, 240 min., 1977.

2 Represita en Jean-Paul Sartre, *Situations V. Colonialisme et néo-colonialisme*, Gallimard, Parizo, 1964.

3 Originale : *Les Damnés de la Terre*. -vl

4 Vd William J. Duiker, *Ho Chi Minh. A Life*, Hyperion, Novjorko, 2001, aparte p. 534 kaj sekvaj.

komplete la ekonomian scenejon komence de la 1990-aj jaroj. Tiu interkonsento havis prezon: la batalo kontraŭ la profundaj sociaj malegalecoj kiuj frapis precipe la nigrulojn, pasis al la dua vico.

La subkomandanto Markos, en Ĉiapo, kritikis la apologion de la „revolucia perforto" kiu superregis en la 1970-aj jaroj: *„Ni ne volas trudi niajn solvojn perforte, ni volas la kreadon de demokratia spaco. Ni vidas la armitajn batalojn ne en la klasika senco de la antaŭaj gerilanoj, do kiel solan vojon kaj solan ĉiopovan veron ĉirkaŭ kiu ĉio organiziĝas. Kio estas decida en milito, tio estas la armea alfrontiĝo, sed temas pri la politiko en tiu alfrontiĝo. Ni ne eniris militon por mortigi aŭ por esti mortigotaj. Ni eniris la militon por ke oni aŭskultu nin."*[5] Sed la zapatista revolucio restis pli en la stato de ebleco ol de realo.

Cetere, la armitaj bataloj estingiĝis kun la fino de la malvarma milito, ĉu en Centrameriko aŭ en Nord-Irlando. Eĉ en Palestino, la Interkonsentoj de Oslo de 1993 ŝajnis fine malfermi la vojon al paco. Restis kelkaj reziduoj, en Srilanko aŭ la ibera parto de Eŭskio, „modeloj" ege malmulte altiraj por la plej multaj revoluciaj fortoj.

Tamen, ĉiuj iluzioj pri la „fino de la historio", pri estingo de la malegalecoj kaj de la mizero, pri la nova internacia mondordo, forviŝiĝis vide al la fiasko de la liberalaj politikoj kaj aventurismaj strategioj de Usono. La certiĝo de Ĉinio kiel de Barato sur la internacia scenejo malfermis manovrospacojn por la landoj de la Sudo. Denove leviĝis la problemo de „ŝanĝo" de la interna socia ordo kaj de la internacia politika ordo, eĉ se tio jam ne okazis nome de la „scienca socialismo", sed de eksplodema miksaĵo de jarmilaj esperoj, de certiĝoj de kultura kaj politika naciismo, de egalismo bazita sur la indiĝenaj aŭ religiaj tradicioj.

Kiam la armita perforto estas frapita de fifamo

LATINAMERIKO, KIU dum longaj jaroj suferis la liberalan „medicinon", komencis tiun novan etapon kun la enpotenciĝo de movadoj deciditaj transformi profunde la situacion kaj doni panon al la plej malriĉaj kaj al la ekskluditoj, unuavice al la indianoj. Kaj la rekta alfrontiĝo kun la regantaj potencoj fariĝas per la respekto de la verdikto de la balot-urnoj. La armita perforto jam ne troviĝas sur la tagordo.

En Proksim-Oriento oni kontestas malpli la socian ordon ol la eksterlandan militan intervenon, unuavice tiun de Vaŝingtono. La armita batalo, ofte farata nome de islamo, ĉu fare de la Hamaso ĉu de la Hizbolaho, kaj larĝe subtenata de la publikaj opinioj, havas sukcesojn. Aliflanke, Al-Kajda, transnacia reto sen loka enradikiĝo, ŝuldas sian tute relativan popularecon al sia kapablo „fari frapojn" al Usono. En Azio, fine, la kontestado de la malegalecoj kombiniĝas, kelkfoje kontraŭdire, kun kapablo de la registaroj mobilizi siajn publikajn opiniojn ĉirkaŭ la defendo de suvereneco tro longe ofendmokita kaj ĉirkaŭ la kritiko al la internacia ordo.

Trans la diverseco de situacioj, en la 1990-aj jaroj kaj komence de la 2000-aj jaroj ja superregis la periodo de „stabileco", kiu nun finiĝas. Malfacilas scii al kiaj ŝanĝegoj ni iras; tamen, la revo pri pli bona mondo, revo same malnova kiel la homaro, sed kies konturoj estas profunde malsamaj ol tiuj de la 1960-aj jaroj, nun revenis ...

Alain GRESH.

5 www.mediatheque-noisylesec.org/...

Reveno de la „goriloj" en Honduro

de Maurice Lemoine

Forkondukita fare de la armeo en plena nokto, poste perforte kondukita al Kostariko, la prezidanto de Honduro, s-ro Manuel Zelaya, estis renversita la 28-an de junio. Tiu puĉo estiĝis sekve al lia decido organizi tiun saman tagon, apogate de kvarcent mil subskriboj, sendevigan popolan konsultadon kun jena demando: *„Ĉu vi konsentas ke, dum la ĝeneralaj elektoj de novembro 2009, estu instalita kvara urno por decidi pri kunvokado de Konstituciiga Nacia Asembleo destinita ellabori novan politikan konstitucion?"*

Laŭ s-ro Zelaya – kiu faras la saman konstaton kaj alprenas la saman metodon kiel s-roj Hugo Chávez (Venezuelo), Rafael Correa (Ekvadoro) kaj Evo Morales (Bolivio), komence de siaj respektivaj mandatoj – la nuna konstitucio ne permesas realigi sociajn transformadojn ebligantajn elradikigi la malegalecojn kaj la mizeron (70 % de la loĝantaro vivas sub la sojlo de malriĉeco aŭ en ekstrema mizero) en lando, Honduro, kie pli ol 40 % de la nacia enspezo venas el sendado de *remesas* (mono) de elmigrintoj.

Rifuzita de la opozicio, frakcio de la Liberala Partio (de kiu devenas s-ro Zelaya), la mastraro, la armitaj fortoj, certaj sektoroj de la katolika kaj evangelia hierarĥio kaj la komunikiloj, tiu konsultado estis juĝita kontraŭleĝa de la Plejsupera Kortumo, la Kongreso kaj la Elekta Tribunalo, kiuj ne volas ke estu anstataŭigita, eĉ se nur parte, „formala demokratio de reprezentado" per „demokratio de civitana partopreno". Male, la artikolo 2 de la hondura konstitucio precizigas: *„La suvereneco apartenas al la Popolo de kiu devenas ĉiuj potencoj de la ŝtato uzataj per reprezentado. La Suvereneco de la Popolo povos ankaŭ uziĝi rekte, tra plebiscito kaj referendumo* (...)*."*

La 24-an de junio, la prezidanto estis eksiginta la generalon Roméo Vásquez, ĉefon de la ĉefstabo de la armeoj. Tiu, malobeante al la ordonoj de la ĉefkomandanto – en ĉiuj demokratioj la ŝtatestro –, rifuzis partopreni en la organizado de la konsultado. Li estis ankaŭ akceptinta la demision de lia ministro pri defendo, s-ro Edmundo Orellana. La rebato ne lasis atendi.

La armitaj fortoj de Honduro, lando kiu, en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj, malsame ol la najbaraj nacioj (Gvatemalo, Nikaragvo, Salvadoro), ne havis internan armitan konflikton, estis tamen implikitaj en la regionan konfliktegon. Ili kunlaboris ĉe la starigo de la malantaŭa usona bazo kiu, per intermetitaj *contras* (kontraŭrevoluciuloj), ebligis la agreson al la sandinisma Nikaragvo (*vidu la artikolon de Hernando Calvo Ospina, „En Nikaragvo, dua vivo de sandinismo", en Le Monde diplomatique en Esperanto de julio 2009*[1]. Morttaĉmentoj konsistantaj el militistoj (speciale la fifama Bataliono 3-16) kaj el policanoj malaperigis cent okdek-kvar homojn kaj murdis dekojn da maldekstraj aktivuloj, sindikatistoj kaj kamparanaj gvidantoj. Post la pac-interkonsentoj de la 1990-aj jaroj, la sandinistoj konservis certan regadon de la nikaragva armeo; en Salvadoro kaj Gvatemalo, la malkaŝo de la amplekso de la krimoj de la armeo, fare de la Komisionoj de la Vero, ebligis purigi, almenaŭ parte, la kazernojn. Nenio tia okazis en Honduro. Kaj Usono tenas tie sian plej gravan militbazon en Centrameriko, Palmerola.

1 http://eo.mondediplo.com/article1520.html

Multaj komunikiloj komprenigas, eĉ, per kovritaj vortoj, pravigas la puĉon per la sinteno de s-ro Zalaya. La revizio de la konstitucio permisintus al li, kvazaŭ per akuŝilo, ofici duan mandaton – aktuale ne permesite – dum la prezidantelekto de venonta novembro. Analizo erara. Laŭ bona logiko, ĉar la baloto pri starigo de Konstituciiga Asembleo okazas la saman tagon kun la prezidantelekto, s-ro Zelaya ne povintus partopreni en tiu. Aliflanke, ĉe la fino de procezo kiu kondukus al nova konstitucio, kaj se tiu estus aprobita, li certe elektiĝus por dua mandato sub protekto de nova konstitucio kiu permesus tion. Estis do longa vojo de pokal' al buŝo.

La obstina kontraŭado al s-ro Zelaya havas do aliajn kialojn.

Elektita en novembro 2005, per malgranda plimulto, sub la flago de la Liberala Partio (konservativa), unu el la du tradiciaj partioj de la hondura oligarĥio, li, kontraste al la prezidintoj, ĉesigis la senkondiĉan aliancon de Honduro kun Usono. Heredanto de nacio senheredigita kaj elrevita de la indiferenteco de Vaŝingtono al liaj help-alvokadoj, li intensigis la politikajn kaj komercajn rilatojn kun Kubo, Venezuelo, Bolivio, vere ne ŝatataj de la registaro de s-ro Georges W. Bush. Post kiam li aligis Honduron al la traktato de *Petrocaribe* (iniciato de la prezidanto Chávez kiu ebligas al la landoj de la regiono pagi la prezojn de la petrolo), li aliĝis al la Bolivara Alternativo por Ameriko (ALBA) kaj la klano de la „radikaluloj" en aŭgusto 2008.

Kun teĥnikoj jam elprovitaj, la similecoj kun la provo de ŝtatrenverso organizita en Venezuelo, en aprilo 2002, kontraŭ la prezidanto Chávez, estas okulfrapaj. Kiel en Karakaso, falsa „letero de demisio" de la ŝtatestro estis legita antaŭ la Kongreso kaj larĝe distrumpetita tra la komunikiloj. Dum la Kanalo 8 – la televido publika – estis silentigita, la privataj stacioj dissendis desegnofilmojn, felietonojn, flaŝfilmojn, la ... meson, sed nenian informon dum la eventoj. La frekvencoj de pluraj aŭdaj kaj vidaj komunikiloj lokaj (Radio Globo, Radio Progreso) kaj internaciaj (TeleSur, Cubavisión Inter-nacional kaj CNN en la hispana) estis suspenditaj.[2] La skipo de TeleSur estis por iom da tempo brutale traktita kaj arestita, kaj poste elpelita el la lando.

Minacataj, malmilde traktataj, la ambasadoroj de Kubo, de Nikaragvo kaj de Venezuelo (kaj ankaŭ la ministrino pri eksterlandaj aferoj Patricia Rodas) estis dum certa tempo retenataj de militistoj kapuĉitaj. En Karakaso, la 12-an de aprilo 2002, estis la ambasadejo de Kubo kiu estis sieĝata.

Tamen, la puĉo en Venezuelo en 2002 kaj la provo malstabiligi s-ron Evo Morales, en Bolivio, en septembro 2008, estis zorge kamuflita danke al la partopreno de opozicio renomita „civila socio". Nenio tia en Honduro. La eliro de la „goriloj" el siaj kazernoj – kvankam la parlamentanoj nomumis sian prezidanton, s-ron Roberto Micheletti nova ŝtatestro – memorigas tro la plej mallumajn horojn de Latinameriko.

2 Dum ĝi multigas la alarmecajn deklarojn pri esprimlibereco en Venezuelo, Bolivio kaj Ekvadoro, la Interamerika Gazetara Societo ankoraŭ ne aŭdigis sin.

Urĝe kunvokita, la Konstanta Konsilantaro de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAŜ) *kondamnis energie la ŝtatrenverson"*, same kiel la Eŭropa Unio kaj la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj (UN). Individue, ĉiuj landoj de la amerika kontinento kondamnis la „ŝtatrenverson". Unu sola, ĝis nun, ne uzis tiun esprimon. Usono. Certe, s-ro Barack Obama esprimis sian „zorgon" kaj aldonis: *„Zelaya estas la sola prezidanto kiun mi konas kaj mi volas ke tio estu tute klara."* Sed la ŝtatdepartemento rekomendas ... *„la dialogon"*. Ĉirkaŭante s-ron Zelaya, ekde la 29-a de junio, en Managŭo, la prezidantoj de la ALBA siavice donis al li totalan subtenon. Sen paroli pri „dialogo", sed pri reveno al la jurŝtato.

En Honduro, la socian movadon trafas la subpremado.

Maurice LEMOINE.

Legitimeco religia, legitimeco demokratia – En la kaldrono de la irana potenco

Post pli ol kvarjara foresto, usona ambasadoro revenis Sirion. Paralele, Vaŝingtono intensigis siajn premojn sur la israela registaro por atingi la kompletan haltigon de la koloniado de la okupataj teritorioj, inkluzive de Jerusalemo – io senprecedenca –, la agnoskon de la rajto de la palestinanoj je vivkapabla ŝtato kaj la rapidan relanĉon de la intertraktadoj pri paco. Fine, s-ro Barack Obama diris esti preta pri dialogo kun Teherano pri ĉiuj temoj de komuna intereso, pri Irako ĝis Afganio tra la atomdemando kaj la israela-palestina konflikto. Sed la irana prezidantelekto de la 12-a de junio, kun la fraŭdoj, la manifestacioj, la mortintoj kaj la perforta subpremo de la kontraŭuloj, igas tiun malfermiĝon pli riska. Kaj la krizo, kiu montras la profundajn dividojn sine de la reganta elitularo mem, povus konduki al naciismaj superpromesoj kontraŭ la Okcidento, destinitaj reunuigi la loĝantaron ĉirkaŭ la potenco.

de Ahmad SALAMATIAN

„NE KONDUTU kiel homoj en fino de mandato kiuj havas nur kelkajn monatojn antaŭ si, sed prepariĝu por ankoraŭ kvin jaroj da regado." Adresante sin al la membroj de la registaro, naŭ monatojn antaŭ la prezidantelekto de la 12-a de junio 2009, la ajatolo Ali Ĥamenej ne hezitis afiŝi sian preferon por daŭrigo de la mandato de sia protektato. Tio signifas la respondecon de la Gvidanto de la Revolucio pri la nuna krizo: li decidis firmigi sian aŭtoritaton, senigi sin je ĉiuj siaj kontraŭuloj sine de la potenco mem kaj kontraŭstari ĉian movoforton de reformo.

La prezidantelekto de 2005 malfermis al li la vojon. Post du mandatoj de la prezidanto Mohamad Ĥatami, la elreviĝo de la popolo estis granda: la reformistoj ja larĝigis la kampon de liberecoj, sed ili montriĝis nekapablaj pritrakti la ekonomiajn kaj sociajn problemojn de la lando.[1] Ok kandidatoj ricevis la permeson kandidatiĝi kaj,

1 Vd *Manière de voir*, n-ro 93, „Tempêtes sur l'Iran", junio-julio 2007.

malgraŭ relative granda partopreno (62,8 %), neniu el ili ricevis plimulton. S-ro Aĥmadineĵad, tiam urbestro de Teherano, ricevis nur 5,7 milionojn da voĉoj el 29,4 milionoj. Por la unua fojo necesis dua baloto.

Vide al la dividoj de la kandidatoj de la reformkampo kaj la malpopulareco de alia kandidato devena el la potenco, s-ro Haŝemi Rafsandĵani, s-ro Aĥmadinaĵad fine gajnis. Kvankam li ĝuis la subtenon de la militistaj, sekurecaj kaj propagandaj organoj, same kiel de la riĉaj karitataj fondusoj dependaj de la Gvidanto, li prezentiĝis kiel homo de la rompo. Li konstruis popolisman retorikon centritan sur la vorto „justeco", kiu estis des pli efika ĉar la usona interveno, ĉefe la milito kontraŭ Irako en 2003, nutris la naciismon, eĉ la fremdulmalamon, en la regiono.

Kvar jarojn poste, s-ro Aĥmadineĵad bone plenumis sian planon: bari la vojon al reformo kaj marĝenigi la iaman aliancanon de la Gvidanto kiu fariĝis ĝena, s-ron Rafsandĵani. Sed lia militema retoriko kaj lia katastrofa ekonomia mastrumado kunigis vastan koalicion, kiu etendiĝas de la pinto de la potenco ĝis la bazo de la socio, malamika al daŭrigo de lia mandato. Eĉ la grupo Osul Garajan (kiu grupigas la fundamentistojn), kiu subtenis s-ron Aĥmadineĵad por la dua baloto en 2005, esprimas siajn rezervojn. Tamen, la deziroj de du proksimuloj de s-ro Ĥamenej, s-ro Ali Larijani, prezidanto de la parlamento, kaj s-ro Mohamad Galibaf, urbestro de Teherano, kandidatiĝi por la prezidantelekto de 2009 (kiel ili faris por la unua baloto de 2005), esperante savi sian tendaron el elekta katastrofo, stumblis super la rektaj intervenoj de la Gvidanto.

En tiuj kondiĉoj, la nova kandidatiĝo de s-ro Ĥatami vekis grandan entuziasmon kiun montras lia mallonga kampanjo dum marto 2009 en la sudaj provincoj. Li ricevis tiam fortajn atakojn de la registara gazetaro. La gazeto Kajhan, sub la plumo de sia direktoro, cetere persona reprezentanto de la Gvidanto, ne hezitis antaŭdiri al li la sorton de Benazir Bhuttto, la pakistana kandidatino murdita eĉ antaŭ la elekto. Sekve al tiuj minacoj kaj al la rifuzo de la Gvidanto kondamni ilin, s-ro Ĥatami decidis, por eviti frontan atakon, retiriĝi el la konkurso.

En tiu momento s-ro Hosejn Musavi finis sian dezert-trairon – li estis ĉefministro inter 1981 kaj 1989, dato je kiu tiu posteno estis forigita –, prezentante sin kiel kandidato de kompromiso, kiel *„la reformisto kiu apogas sin sur la fundamentoj* [de la islama revolucio]". Li volas esti la ariganto ne nur de la reformistoj, sed ankaŭ de parto de la Osul Garajan kiuj rifuzas agnoski duan mandaton de s-ro Aĥmadineĵad.

Gvidinte la registaron dum la longa milito kontraŭ Irako kaj partopreninte en la precipaj decidoj de la nova revolucia potenco, s-ro Musavi estas ĉio alia ol „okcidenta liberalulo"; Usono eĉ akuzis lin esti mendinta la atencon kontraŭ la ĉefstabo de la usonaj marsoldatoj en Bejruto en 2003, kiu kaŭzis pli ol 240 mortviktimojn. Tamen, la homo maturiĝis, kaj, kiel multaj agintoj de la revolucio de 1978–1979, pensas ke la reĝimo devas adaptiĝi. La Gvidanto siavice ne dividas tiun opinion.

La Konsilantaro de Gardistoj de la Konstitucio, taskita elekti la „akcepteblajn" kandidatojn por la prezidantelekto kaj de kiu ok membroj el dek proklamis sian subtenon por s-ro Aĥmadineĵad, provas gajni tempon. Ĝi eluzas ĉiajn templimojn por konservi la malcertecon kaj kiom eble plej limigi la kampanjotempon de la pretendantoj, dum la ĝistiama prezidanto trairas la landon jam de monatoj kaj ĝuas la subtenon de la gazetaroj kaj de la fondaĵoj dependantoj de la Gvidanto, krome la ŝtatajn rimedojn. Nur en la lasta tago de la leĝa templimo la Konsilantaro validigas kvar virajn pretendantojn (el sume 475, el kiuj 42 virinoj).

La arĥitektoj de tiu skemo kredis esti ĉion antaŭvidintaj. Ili lasis en la batalo du reformistajn kandidatojn, s-rojn Musavi kaj Mehdi Karubi – prezidinto de la parlamento –, kiuj, en principo, devas neŭtraligi sin, kaj konservativulon, s-ron Mohsen Rezaj, iama ĉefo de la Gardistoj de la Revolucio, kiu prezentiĝas kiel kandidato sendependa.

Tiel Irano iras sturme al mallonga elektokampanjo de dudek-du tagoj kiu renversis la planojn de ĝiaj organizintoj kaj kaŭzis tertremon interne mem de la reĝimo. Antaŭ la oficiala malfermo de la kampanjo, la ŝtataj radio kaj televido donis nenian sendotempon al la reformistaj kandidatoj. Tamen ili kritikis ilin ĉiutage, raportante iliajn internajn kverelojn, ĉu verajn aŭ imagitajn, kaj sen iam ajn doni al ili la rajton je respondo. Esperante eviti tro larĝan debaton, la ŝtata televido decidis fine okazigi alfrontajn debatojn.

Laŭ lotada hazardo kiu atribuas koloron al la televid-emblemoj de ĉiu kandidato, la verda koloro estas atribuita al la kandidato Musavi. Tiu fariĝis poste tiu de la „verda revolucio".

Dum tiuj elsendoj, la meĥanismo elbridiĝas. Ekde la unuaj debatoj, s-ro Aĥmadineĵad elektas la atakon kiel defendmanieron. La senprecedenca vigleco de la polemikoj rompas la striktan kadron de la ruĝaj linioj de la Islama Respubliko. Dekoj da milionoj da televidantoj restas ĝis malfrue en la nokto antaŭ sia televidilo. La plej eminentaj aŭtoritatuloj estas akuzataj je korupto, kaj la prezidanto mem estas traktata kiel mensogulo. S-ro Rafsandĵani estas publike denuncata de s-ro Ahmadinaĵad, tiom ke li skribas publikan protestleteron al la Gvidanto.

La debatoj montras la deziron je libereco de la irananoj. Ĉio okazas kvazaŭ la socio agas por sia transformiĝo en demokration. La militemaj temoj kaj la kutimaj dogmoj de la oficiala retoriko sonas subite falsaj. Devigita eliri el sia retoriko, s-ro Aĥmadineĵad uzas ekonomiajn nombrojn kaj indikilojn, tuj denuncitajn falsitaj de liaj kontraŭuloj. Tiuj sukcesas levi la temon de la inflacio, de la senlaboreco, de la katastrofa bilanco de la ekonomio.[2] La vigleco de la debatoj ebligis tiam antaŭvidi fortan partoprenon en la elektoj. Tiu povas nudigi fundamentan kontraŭdiron de la islama reĝimo: ĝian duoblan legitimecon, kiun ilustris desegnaĵo publikigita de la *International Herald Tribune* la 24-an de junio 2009, kiu montras la ajatolon Ĥamenej antaŭ du elektantoj, kun tiu klarigo: *„La teokratio klarigita. Vi voĉdonas kaj Dio decidas."*

Efektive, la antaŭprojekto submetita al la unua Konstitucianta Asembleo en 1979 disponis starigon de prezidanta potenco elirinta el la popola suvereneco (artikolo 6). Nome de la dia suvereneco, tiu asembleo konsistanta plejmulte el religiuloj, trudis religian kuratorecon (velajat-e fakih) (artikolo 5). La esenca parto de la decid-atribuaĵoj de la prezidanto de la respubliko estis tiel konfiskitaj de religia Gvidanto dotita je absoluta kontrolo de la tri potencoj leĝdona, plenuma kaj jura (artikolo 57).

La sufoka kuratoreco de la Gvidanto

ESTAS LA GVIDANTO kiu difinas la ĝeneralan kadron de la politikoj de la respubliko (vidu Olivier Pironet : La strukturoj de la reĝimo.). Li estas la ĉefkomandanto de la armitaj fortoj, deklaras militon kaj pacon, dekretas ĝeneralan mobilizon, decidas okazigon de referendumoj, nomumas la religiajn membrojn de la Konsilantaro de Gardistoj de la Konstitucio, li estas la respondeculo pri la jura potenco, la direktoro de la organizaĵo kiu havas la monopolon de radio kaj televido, la ĉefo de la ĉefstabo de la armeoj, la komandanto de la Gardistoj de la Revolucio, la militaj kaj sekurecfortaj komandoj. Estas li kiu kunordigas la tri konstituciajn potencojn kaj kiu arbitracias iliajn konfliktojn. Li povas eĉ, en certaj kondiĉoj, transpaŝi la regulojn de la konstitucio aŭ eĉ ... tiujn de la ŝario.[3] Kiel reprezentanto de la kaŝita imamo[4] sur tero, la Gvidanto disponas pri preskaŭ senlimaj povoj.

La prezidanto de la respubliko, dua eminentulo de la ŝtato, estas taskita nur pri mastrumado, pri administrado de la kurantaj aferoj en la ekonomiaj kaj sociaj kampoj – kaj tio sub la sufoka kuratoreco de la Gvidanto kaj de la ne elektitaj organoj kiujn tiu dominas ekster ĉia popola kontrolo.

Tamen, la rekta universala voĉdonado donas al la prezidanto demokratian legitimecon. Pro tio, lia elekto superas sian celon kaj fariĝas, unufoje ĉiujn kvar jarojn, la okazo por esprimi la popolan volon – eĉ bridite kaj enkadrite. La legitimeckonflikto inter la elektito de la universala voĉdonado kaj la politikaj-religiaj institucioj de la ŝtato estas la precipa dinamiko de la historio kiu okazas en la pinto de la povo.

En januaro 1980, kelkajn monatojn post la revolucio, s-ro Abolhasan Bani Sadr estis la unua elektita prezidanto de la respubliko. Tiam estis 95 kandidatoj. Konflikto kun la imamo Ruholah Ĥomejni kondukas al lia eksigo en junio 1981 en cirkonstancoj kiuj memorigas tiujn kiujn Irano spertas aktuale. La du prezidant-mandatoj de la nuna Gvidanto, s-ro Ĥamejni, elektita inter 1981 kaj 1989 dum la milito inter Irano kaj Irako, estis ankaŭ stampitaj de tiu streĉiteco en la koro de la reĝimo. Efektive, Ĥomejni trudis s-ron Musavi kiel ĉefministron kaj limigis s-ron Ĥamenej al tio kion la generalo Charles de Gaulle nomis la „solena malfermo de la krizantemoj".

Post la morto, en 1989, de Ĥomejni, kies religia aŭtoritato estis senkontesta, la nomumado de nova Gvidanto estis problema. S-ro Ĥamenej, kiu anstataŭas lin, estas simpla *hadjatoleslam*, avancita granda ajatolo de unu tago al alia, iomete kvazaŭ pastro fariĝus papo en unu sama tago. Parte, s-ro Ĥamenej dankas sian avancon al s-ro Rafsandĵani, kiu tiam plenumis la funkcion de prezidanto.

La du mandatoj de s-ro Rafsandĵani kiel prezidanto (1989–1997) ne eskapis la legitimeckonflikton, sed sen konduki al gravaj krizoj. La restrikto de la nombro da kandidatoj permesataj kandidatiĝi – kaj kiuj plenumis verdire nur rolojn de statistoj – sekvigis malaltan partoprenon en la elektoj.

En 1997, kun partopreno kiu realtiĝis al 79,9 %, s-ro Ĥatami venkis kiel homo de la reformo, ĉar li superis la kandidaton subtenatan de la Gvidanto. Tiu venko, nepensebla en la plej multaj aliaj landoj de Proksimoriento, kie nur la oficiala kandidato povas venki, plene prilumis la konflikton inter la du legitimecoj. La du sinsekvaj mandatoj de s-ro Ĥatami kaj liaj reformprovoj estis stampitaj de konstanta blokado fare de la Gvidanto. Tiu komencis percepti la evoluon de kontestado kiel minacon kontraŭ lia propra potenco. En 2005, s-ro Ĥamenej provis trudi sian kandidaton : tiu estis s-ro Aĥmadineĵad.

Kvar jarojn poste, kontraŭ la konsiloj de multaj liaj proksimuloj, s-ro Ĥamenej decidis subteni lin denove, je kia ajn prezo. La 12-an de junio, la elektantoj premiĝas antaŭ la voĉdonoficejoj. Ĉio okazas en kalmo. Sed, ekde la 17-a horo, eĉ antaŭ la fino de la voĉdonado, la komandanto de la sekurecfortoj de Teherano anoncas televide ke liaj fortoj dismetiĝos surloken. Poste oni komencas forpeli la reprezentantoj de la kandidatoj el la voĉdonoficejoj kaj el la lokoj kie tiuj estas centrigitaj. La komunaj protestoj de la tri kontraŭuloj neniel efikas. Plumba silento falas sur la elektosalono de la ministrejo pri internaj aferoj kie la rezultoj estis proklamotaj, dum la gazetaraj agentejoj de la partizanoj de s-ro Aĥmadineĵad, kiel la agentejo Fars aŭ ties kampanja retejo *Rajanews*, komencas publikigi fantaziajn nombrojn.

Amasa fraŭdo

LA KONSTERNIĜO estas ankoraŭ pli granda kiam, en la sekvantaj horoj, la ministro pri internaj aferoj konfirmas tiujn indikojn kaj deklaras ilin definitivaj. La nombroj estas publikigitaj unue je pakaĵoj de 2 milionoj sen ajna referenco al la voĉdon-oficejo kaj la loko de la voĉoj. Poste, post kelkaj horoj da silento kaj frumatene de la 13-a de junio, oni denove anoncas la rezultojn laŭ blokoj de 5 milionoj da voĉoj en la samaj kondiĉoj : estas ĉiam la komunikiloj favoraj al la prezidinto kiuj publikigas ilin unue, sekvataj de la ministro pri internaj aferoj ...

Krome, kvankam la nombro da voĉdoniloj nombritaj progresas ĝis 39 milionoj – do partoprenkvoto de 85 % –, la elcentaĵo atribuita al ĉiu kandidato restas la sama dum la tuta nokto, kvazaŭ, en ĉiuj urboj kaj regionoj, kaj sendepende de la lokaj kondiĉoj, la elektantoj voĉdonintus en la samaj proporcioj por la samaj kandidatoj. Necesis atendi dek tagojn por disponi pri rezultoj laŭ la provincoj.

Laŭ la oficialaj donitaĵoj, s-ro Aĥmadineĵad ricevis 62,63 % de la voĉoj, do 24.527.516 voĉojn. Tiel, post kvar jaroj da potencmisuzo kaj ekonomia bilanco tute ne flata, li kvinobligintus la 5.751.000 voĉojn ricevitajn ĉe la unua baloto de la elekto de 2005. Ĉe la kontraŭa flanko, kun nur 333.635 voĉoj, unu el liaj kontraŭuloj, s-ro Karubi, rikoltintus dekkvinoble malpli da voĉoj ol en 2005.

Diversaj laboraĵoj alportas kredindon al tiuj kiuj supozas amasan fraŭdon – kaj eĉ la potenco elvokis malregulaĵojn kiuj koncernas ... 3 milionojn da voĉoj. Laŭ studaĵo de *Chatham House* (Londono)[5], en du provincoj

2 Vd Ramine Motamed-Nejad, „Irano sub influo de la mono", Le Monde diplomatique en Esperanto, junio 2009.

3 Pri tiu interesa aspekto, vd „L'imam Khomeiny se retourne contre les conservateurs [La imamo Ĥomejni turnas sin kontraŭ la konservativuloj]", *Le Monde diplomatique*, junio 1988.

4 Laŭ la ŝijaisma teorio, la dekdua imamo malaperis en 874. Por Ruhollah Ĥomejni, la Gvidanto estas lia reprezentanto sur tero kaj disponas pri senlima aŭtoritato. Tiu teorio de la *velajat-e fakih* estas kontestata de aliaj ajatoloj.

5 www.chathamhouse.org.uk/files/14234

estis pli ol 100 % de voĉdonintoj. Por atingi la rezultojn kiuj estas al li atribuitaj, s-ro Aĥmadineĵad devintus rikolti ne nur la konservativajn kaj centrismajn voĉojn, sed preskaŭ duonon de la reformismaj voĉoj en triono de la provincoj. Fine, kaj kontraste al kliŝa opinio, la konservativaj kandidatoj estis ĉiam iom malpopularaj en la kamparoj, kiel pruvis la elektoj de 1997, 2001 kaj 2005. Laŭ la studaĵo de *Chatham House*, estas eĉ tie kie la konservativuloj ofte ricevas siajn plej malbonajn rezultojn, precipe ĉar en tiuj regionoj loĝas naciaj malplimultoj kiuj estas pli hezitemaj pri la centra potenco. Per kia miraklo s-ro Aĥmadineĵad estus ricevinta plimulton en 2009 ?

Krome, la popolaj tavoloj, speciale la laborista klaso, troviĝas inter la unuaj viktimoj de ekonomia politiko stampita de inflacio supera al 20 % kaj de amasa senlaboreco kiu frapas unuavice la junulojn. Kiel s-ro Aĥmadineĵad estus tiujn konvinkinta ?

Tagon post la „venkofesto" de s-ro Aĥmadineĵad, gratulita de la Gvidanto, milionoj da manifestaciantoj en Teherano kaj en la provinco elkriis sian indignon fronte al tio kion ili konsideris deturnadon de iliaj voĉoj. Tiu mobiliziĝo, kiu limiĝis esence al la mezaj tavoloj, estintus sendube pli problemeca se la Bush-registaro daŭre ekzistus, kun sia militisma retoriko kaj sia senkondiĉa apogo al sia israela aliancano. La dialogemo de la prezidanto Barack Obama parte liberigis la irananojn el sia timo kontraŭ Usono kaj la eksterlandaj enmiksiĝoj. Kontraste al siaj eŭropaj kaj franca kolegoj, la usona prezidanto efektive sciis teni la ekvilibron inter la rifuzo de enmiksiĝo en la internajn aferojn de suverena lando kaj la kondamno de la subpremo.

De la sorto de la bataloj kaj de la alfrontiĝoj en Teherano dependas ne nur la estonteco de la Islama Respubliko, kiu trairas la plej gravan krizon de sia historio. Interna akriĝo povus montriĝi ankaŭ per superpromesoj kontraŭ la Okcidento, kiu farus dialogon inter Vaŝingtono kaj Teherano pli malfacila.

Ahmad SALAMATIAN.

Apero de la pirata povo

de Philippe RIVIÈRE

PER 7,1 % DE LA voĉoj, la tutjuna Pirata Partio de Svedio ricevis rimarkitan eniron en la Eŭropan Parlamenton, la 7-an de junio 2009. Ĝi sendas al Strasburgo du deputitojn. La unua, s-ro Lars Christian Engström, 49-jara entreprenisto pri komputiko, sidos tie plenrajte. La dua, s-ino Amelia Andersdotter, 21-jara, studento pri ekonomio ĉe la universitato de Lundo, havos, pro la strangaj reguloj de tiuj elektoj, nur observan seĝon.[1]

Necesas konsideri serioze la aperon de tiu nova politika propono. Post nur tri jaroj da ekzisto, la *Piratpartiet* fariĝis, kun 49.000 membroj, la tria forto laŭ membroj de la sveda politiko.[2] (Ĝiaj kontraŭuloj emfazas ke la aliĝo estas senpaga.) Kun programo bazita sur laŭleĝigo de kundividado de dosieroj, la junuloj de 18 ĝis 30 jaroj, precipe la viraj, amase aliĝis en 2009, sekve al la proceso de *The Pirate Bay*, sveda interretejo kiu proponas serĉilon specialiĝintan pri la „torentoj", tiuj dosieroj kiuj ebligas al unuopuloj inter si el- kaj al-ŝuti filmojn, muzikon, programojn ktp.

Kondamnitaj al jaro da malliberejo kaj monpuno je 30 milionoj da kronoj (2,8 milionoj da eŭroj), la animantoj de la retejo tamen argumentis ke ilia serĉilo ne donas aliron al la filmoj mem kaj ke esplorado per Guglo donas precize la samajn informojn. Envere, la diferenco kuŝas en la sinteno: en unu kazo (Guglo) oni ŝajnigas ja voli respekti la aŭtorajn rajtojn, eĉ se la eksterordinara kresko de la filmetejo Jutubo *YouTube*, filio de Guglo, fariĝis grandparte per „piratita" katalogo; en la alia (Pirate Bay), oni primokas la leterojn senditajn de la advokatejoj kaj filmproduktistoj de Holivudo, kaj oni montras flagon: la nigran flirtantan.

La kondamno de *The Pirate Bay* kaj la provo subpremi la kundividadon de dosieroj tuŝas rekte la ĉiutagan vivon de preskaŭ la tuta junularo sveda – kaj eŭropa. Ĉu laŭleĝa aŭ ne, la elŝutado de individuo al individuo estas praktikata same amase kiel en alia epoko la kopiado de sonkasedoj aŭ de disketoj. La „kulturindustrio" havas grandan penon respektigi sian vidpunkton, laŭ kiu la kulturo estas havaĵo kiu *konsumiĝas*. Kaj la grandaj partioj, ĝis nun, ne proponis kontentigan solvon al la demando de la aŭtorrajto fronte al la kundividado de dosieroj.

Pli ĝenerale, la politikigo de tiu demando malkaŝas mankon de perspektivo antaŭ la transformiĝo de industria mondo al reta funkciado. Maloftas la registaraj respondeculoj kun minimumo da teĥnika kompetento.[3] La fuŝoj de la franca ministro pri kulturo, s-ino Christine Albanel, atestas tion abunde.

Tamen, oni ja ne kreas partion ĉiam kiam oni volas defendi ian vidpunkton. Estas ekstreme malofta ke specifa temo kondukas al aparta politika propono. La politika ekologio, kiu levis pli fundamentajn demandojn ol la Pirata Partio, bezonis plurajn jardekojn antaŭ ol elmarĝeniĝi kaj ricevi elektitojn. La listoj „por Palestino" aŭ por permeso de kanabo neniam superis la stadion de opiniatesto. La movadoj de ĉasistoj, siavice, estas pli kolektiĝejo por protestvoĉo ol konstruita politika propono.

La ekzistantaj partioj havas vere intereson ĝisdatigi sian „programaron" kaj revizii sian retorikon pri la komputika revolucio. La ŝanceliĝoj kaj dividoj de la maldekstraj partioj pri la intelekta proprieto montris la nescion pri la temo de la granda plimulto de la politika reprezentularo. La sinsekvaj raportoj pri la „cifereca socio" montras mirfrapan intelektan naivecon kiu plej ofte reduktas tiun profundan ŝanĝon de sociaj rilatoj al simplaj „aver-eblecoj".[4] La „subteno al la artistoj" – pri kiu multaj artistoj, kontraŭflue, bedaŭras ke ĝi alprenis la formon de milito de la rajtuloj kontraŭ la publiko – mutigis la politikan diskuton. Tiu aliflanke evoluis en Interreto, kie ekzistas multaj proponoj por revigligi la kulturon kun partopreno de publiko malpli konsumisma kaj pli kaj pli „aktora".[5]

En Francio, la debatoj pri la leĝo „Interreto kaj kreado"[6] ebligis tamen al kelkaj deputitoj – precipe verduloj kaj socialistoj – iom rerespektigi la politikon ĉe la retanoj. Sen tio, oni povus veti ke franca Pirata Partio povintus nutri sin el la ŝoko kaŭzita de leĝo kiu disponas la tranĉon de la interretkonekto por la retanoj kiuj ne sekurigis sian lineon. La leĝpropono Hadopi estis tamen rifuzita, la 10-an de junio, de la Konstitucia Konsilantaro, pro, inter aliaj konsideroj, rompo de *„komponanto de la esprim- kaj konsum-libereco"*, kiu per tio konfirmis la analizon de la Eŭropa Parlamento, por kiu la aliro al Interreto ebligas al la civitano uzi siajn fundamentajn liberecojn de esprimiĝo kaj informiĝo.[7]

La demando koncernas ne nur la maldekstron, ĉu laboristan aŭ ekologiistan. Parto de la dekstro kontraŭbatalas, sur „liberalaj" teoriaj bazoj, la *big-brother*-igon de la ŝtato kiu volas instali „spionojn" en la personaj komputiloj, aŭ la jurajn kaj komercajn trudojn je intelekta proprieto kiuj kondukas al monopoloj kiaj tiu kiun ĝuas Mikrosofto aŭ la farmaciaj firmaoj.

Kvankam malmulte reprezentata en Eŭropo, ankaŭ la liberecana folkloro estas parto de la retoriko de la „piratoj". Tiel, la ĉefo de la *Piratpartiet*, s-ro Richard Falkvinge, prezentas sin kiel *„ultrakapitaliston"*. *„La konservativuloj ne estas por la pura kapitalismo*, klarigas li en interparolado kun la magazino *Fokus*. *„Ili estas speco de socialliberaluloj duone tedaj.* (...) *Mi difinas min kiel ultrakapitaliston, kaj ekde tiu poziciiĝo mi engaĝiĝis politike.* (...) *La batalo koncernas nun la rajtojn de la civitanoj, kio estas la plej grava temo. Pli grava ol la san- aŭ la eduk-sistemo, la atomdemando, la defendo kaj tiun tutan koton pri kio oni debatas de kvardek jaroj."* La Pirata Partio, emfazas s-ro Falkvinge, *„defendas eĉ formon de cifereca komunismo, en kiu ĉiu kontribuas laŭ siaj kapabloj kaj kie la produkto estas distribuata laŭ la bezonoj."*[8]

La juna sveda deputitino Amelia Andersdotter, siaflanke, volas transdoni parton de sia eŭropa salajro al organizaĵoj kiel Amnestio Internacia, Attac-Svedio, Ordfront (en Svedio tre grava alternativa eldonejo kaj etikedita „maldekstra"), aŭ al la Disvolvo-Fonduso de la Unuiĝintaj Nacioj por la Virino (Unifem).[9]

Malfacilas do eltrovi kiel la Partio povos difini sin ekster la kampo de ciferecaj liberecoj. Ĝi ja iomete eniras la kampon de la sano, publikigante pozicion pri la farmaciaj patentoj kiu proponas aliajn modelojn por financi la esploradon de novaj utilaj medikamentoj.[10] Sed krome ?

„La Piratpartio ne havas fortan opinion pri io ajn alia ol la liberecoj en Interreto; pri la aliaj temoj ĝi voĉdonos kun la aliaj partioj."[11]. La respondeculoj de la Piratpartio ripetas ke, ĉar la tranĉlinio dekstra-maldekstra perdis ĉian trafecon, estos nenia malfacilo apliki tiun regulon. Kiel ĝia retejo anoncas[12], ĝia strategio konsistas en alpreni la rolon de ŝlosilŝtono de la plimulto en la *Riksdag*, la sveda parlamento. Kun 7 % da voĉoj, tio povos eble funkcii ... almenaŭ se tio ne kondukas al ĝia eksplodo.

Philippe RIVIÈRE.

La subpremata memoro de la Okcidento

de Alain GRESH

EN 1927, HENRI Massis, abundeca influhava verkisto, krozmilitas kontraŭ la danĝeroj kiuj amasiĝas sur la eŭropaj valoroj kaj spirito – kiujn li larĝe identigas kun tiuj de Francio: *„La destino de la civilizacio de la Okcidento, la destino de la homo ĝenerale estas hodiaŭ minacataj.* (...) *Ĉiuj vojaĝantoj, ĉiuj eksterlandanoj kiuj vivas delonge en la Ekstrem-Oriento asertas al ni: en dek jaroj, la spiritoj estos pli profunde ŝanĝiĝintaj ol en dek jarcentoj. Al la malnova kaj facila submetiĝo sekvis surda malamikeco, kaj kelkfoje ĝis ago. De Kalkato ĝis Ŝanhajo, de la mongolaj stepoj ĝis la anatoliaj ebenaĵoj, la tuta Azio estas movata de surda deziro je liberiĝo. La supereco kiun kutimis la Okcidento ekde la tago en kiu Johano Sobieski definitive haltigis la sturmon de la turkoj kaj tataroj kontraŭ la muroj de Vieno*[1]*, tiu supereco jam ne estas rekonata de la azianoj. Tiuj popoloj aspiras refari sian unuecon kontraŭ la blankulo kies katastrofon ili proklamas."*[2] Envere, Massis ne tute malpravis : ĉie konturiĝis la ribelado de la koloniitaj popoloj.

En tre malsama kunteksto ol tiu de la tempo post la unua mondmilito, stampita ankaŭ de sinsekvaj tertremoj – fino de la malvarma milito, atencoj de la 11-a de septembro, militoj kontraŭ Irako kaj Afganio ktp – kaj, ĉefe, de la reorganizado de la mondo profite al novaj potencoj kiel Ĉinio aŭ Ba-

---

_iranelection0609.pdf Kp ankaŭ la rimarkojn kaj analizojn de la demografiistino Marie Ladier-Fouladi, „Le dessous des cartes électorales", La Vie des idées, 23-a de junio 2009, www.laviedesidees.fr/Iran-le-dessous-des-cartes.html

1 La Lisbona Traktato donas 20 seĝojn al Svedio, sed atende ĝian eventualan ratifikon, Stokholmo disponas nur pri 18 seĝoj. La du „mankantaj" deputitoj estis tamen nomumitaj dum la voĉdonado de la 7-a de junio kaj jam nun disponas pri statuso de observanto.

2 La historio de la partio, kiel de la retejo *The Pirate Bay*, estas detale prezentita de Anders Rydell kaj Sam Subdberg en *Piraterna*, Ordfront, 2009, kiu disponeblas ankoraŭ nur en la sveda.

3 Ni tamen indiku ke s-ro Jeff Moss, fondinto de DefCon, konferenco de *hackers*, estas ĵus nomumita de la registaro de s-ro Barack Obama en la konsultan konsilantaron pri usona interna sekureco. „La registaro de Obama alvokas faman *hacker* por protekti Usonon", *20minutes.fr*, 8-a de junio 2009.

4 Vd pri tio la kontribuaĵon de Bernard Stiegler en *Pour en finir avec la mécroissance. Quelques réflex*ions d'Ars industrialis, Flammarion, 2009. Teksejo http://arsindustrialis.org/publications

5 Vd Philippe Aigrain, *Internet & Création*, InLibroVeritas, 2008. Libro libere elŝutebla [en la franca] ĉe la adreso http://paigrain.debatpublic.net/ ? page_id=171

6 Vd « Hadopi ou la déconnexion », La Valise diplomatique, 6-a de majo 2009.

7 Kp Guillaume Champeau, « Bruxelles se félicite de la sacralisation de l'amendement Bono », Numerama, retpaĝo: http://www.numerama.com/magazine/13128-Bruxelles-se-felicite-de-la-sacralisation-de-l-amendement-Bono.html

8 Claes Lönegård, „Hjärnan bakom piraterna" (La cerbo de la Piratoj), *Fokus*, Stokholmo, 5-a de junio 2009. http://www.fokus.se/2009/06/hjarnan-bakom-piraterna/ – La frazo estas citaĵo el Karlo Markso kaj Frederiko Engelso: Manifesto de la Komunista Partio. Tradukita de Detlev Blanke, Moskvo, 1990, 82 paĝoj, ISBN 5010023415, 3,60 €. -vl

9 „Amelia 2.0", *Lundagård* (studenta gazeto), Lundo, junio 2009, retejo: http://www.lundagard.se/2009/06/01/amelia-20/

10 d „An alternative to pharmaceutical patents", www.piratpartiet.se/an_alternative_to_pharmaceutical_patents

11 Vegard Andreas Larsen, „Svenske Piratpartiet ble i går stemt inn i EU-parlamentet" (La sveda Piratpartio eniris hieraŭ la Eŭropan Parlamenton), Hardware.no, 8-a de junio 2009, retpaĝo: www.hardware.no/artikler/piratpartiet_inn_i_eu-parlamentet/70186

12 www.piratpartiet.se/international/

1 Aludo al la batalo de la 12-a de septembro 1683, dum kiu la Otomanoj estis venkitaj de la Sankta Ligo konsistanta el la poloj, germanoj kaj aŭstroj.

2 *Défense de l'Occident [Defendo de la Okcidento]*, Plon, Parizo, 1927.

rato, reaperas la samaj timoj. Pruntante al maniĥea koncepto de la historio kiel senĉesa alfrontiĝo inter civilizacio kaj barbareco, multaj aŭtoroj, ofte prestiĝaj, enirigas nin en tempomaŝinon por trovi la radikojn de tiu „milito de du mil kvincent jaroj" – laŭ la subtitolo de verko de Anthony Pagden, *Worlds at War* – kiu ŝprucigas nian planedon hodiaŭ per sango.

Tiu profesoro instruis en la plej prestiĝaj universitatoj – Oksfordo, Kambriĝo kaj Harvardo. Ili pentras, sur proksimume kvincent paĝoj, krudan bildon de la mondhistorio. *„Flamo estis fajrigita en Trojo kiu devis bruli konstante tra la jarcentoj, dum al la trojanoj postsekvis la persoj, al la persoj la fenicoj, al la fenicoj la parteroj, al la parteroj la sasanidoj, al la sasanidoj la araboj, al la araboj la turkoj.* (...) *La linioj de alfrontiĝoj modifiĝis, kaj la identeco de la kontraŭuloj ankaŭ. Sed la maniero, en kiu la du partioj komprenis kio disigis ilin, restis stabila, apogante sin kiel ĉiam sur perceptoj, sur akumulitaj historiaj memoraĵoj, iuj sufiĉe ĝustaj kaj aliaj komplete malĝustaj."*

Malgraŭ tiu malgranda rezervo pri la memoraĵoj *„komplete malĝustaj"*, la aŭtoro reprenas, laŭlonge de sia argumentado, duecan vizion kies fonda epizodo estis, laŭ li, la alfrontiĝo inter la grekoj kaj la persoj, raportita de la greka historiisto Herodoto.

Herodoto montras, laŭ Pagden, ke *„kio disigas la persojn de la gregoj aŭ la azianojn de la eŭropanoj, estis pli profunda ol malgrandaj politikaj konfliktoj. Tio estis mondpercepto, kompreno de kio signifis esti kaj vivi kiel homa estulo. Kaj dum la grekaj urboj, kaj pli larĝe tiuj de « Eŭropo », havis tre diversajn personecojn, diversajn tipojn de socioj kaj estis tro kontentaj perfidi reciproke unu la alian kiam tio utilis, ili tamen posedis komunajn elementojn de tiu mondpercepto. Ili povis ĉiuj distingi sklavecon kaj liberecon, kaj ili dividis ĉiuj tion kion ni hodiaŭ konsideras kiel individuisman percepton de la homaro."*

Paul Cartledge, profesoro pri greka historio ĉe la universitato de Kambriĝo, ne diras alion en sia libro pri la Termopiloj, tiu „batalo kiu ŝanĝis la mondon". *„Tiu alfrontiĝo, skribas li en la enkonduko, la alfrontiĝo inter la spartanoj kaj la ceteraj grekoj unuflanke kaj la persa hordo (kiu inkludis grekojn), estis alfrontiĝo inter libereco kaj sklaveco kaj estis perceptata kiel tia, en tiu epoko same kiel poste.* (...) *La batalo de la Termopiloj, resume, estis turnopunkto ne nur de la historio de la klasika Grekujo, sed en la mondhistorio."* Ĉu ne estas la ekonomikisto Stuart Mill, meze de la 19-a jarcento, kiu asertis ke la batalo de Maratono estis „pl*i grava ol la batalo de Hastings*[3]*, eĉ por la brita historio"*?

Por puni nigrulan tribon, necesas bruligi ĝiajn vilaĝojn

EN SIA ANTAŬPAROLO, Cartledge ne kaŝas sian ideologian perspektivon : *„La eventoj de la 11-a de septembro en Novjorko kaj de la 7-a de julio en Londono donis al tiu projekto* [kompreni la sencon de la batalo de la Termopiloj] novajn urĝecon kaj gravecon en la kadro de la kultura renkontiĝo inter Oriento kaj Okcidento." „Renkontiĝo" kiu estas nenio alia ol la kolizio inter „despotismo" kaj „libereco"...

Tiu universitata reprezentiĝo estis popularigita en la filmo pri la batalo de la Termopiloj aperinta en 2007, *300*, de Zack Snyder, reprenita de samnoma bildstrio de Frank Miller kaj Lynn Varley. La filmo, sukceso ĉe la usona *box-office*, daŭras du horojn kaj similas al video-ludo dominata de belaj muskolecaj viroj, dopitaj de amfetaminoj, alfrontantaj barbarojn (nigrajn aŭ de la tipo « proksim-orienta » inneciĝintaj kiujn oni povas mortigi sen konsciencriproĉoj. *„Ne faru kaptitojn"*, lanĉas la heroo, la reĝo Leonido, tiu sama kiu, komence de la filmo, mortigas la persan ambasadoron : la sovaĝuloj ne meritas ke oni apliku al ili la plej sanktajn leĝojn de la homaro.

La civilizacio, tio estas do la ekstermado de la barbaroj! Jam en 1898, Heinrich von Treitschke, germana spertulo pri politika scienco, asertis tion kio, por multaj liaj samtempuloj, ŝajnis esti banalaĵo: *„La internacia juro fariĝas nuraj frazoj se oni volas ankaŭ apliki ĝiajn principojn al la barbaraj popoloj. Por puni nigrulan tribon, necesas bruligi ĝiajn vilaĝojn; oni atingos nenion sen fari tiajn ekzemplojn. Se, en similaj okazoj, la germana imperio aplikus la internacian juron, tio ne estus humaneco aŭ justeco, sed honta malforteco."*

Kaj la germanoj ne montris „malfortecon" kiam ili ekstermis la hererojn, en la afrika Sud-Okcidento (la nuna Namibio, inter 1904 kaj 1907, farante la unuan genteksterm on de la 20-a jarcento kiu, kun multaj aliaj, servis kiel modelo kaj antaŭaĵo al la gentekstermo de la judoj fare de la nazia Germanio.

Nia historio komenciĝas ĉe la grekoj, kiuj inventis la liberecon kaj la demokration

ONI POVAS ANKAŬ la spartanojn de *300* ne akuzi pri „malforteco". Ili mortigas la infanojn tuŝitajn de misformiĝoj kaj malpermesas al la virinoj partopreni en la Senato. La milito siavice estas la pinto de atingoj de la viroj. Miller, la konceptinto de la bildstrio, ne kaŝas siajn ideologiajn elektojn : *„Nia lando* [Usono] *kiel la tuta okcidenta mondo estas nun alfrontita al ekzistograva malamiko kiu siavice scias precize tion kion li volas."*

Cartledge asertas ke ne ekzistas persa rakonto pri la Medaj Militoj, nenia indiĝena Herodoto. Tamen, multaj konoj estis akumulitaj pri la persaj imperioj, kiuj modifas la perspektivojn. Touraj Daryaee, profesoro pri malnova historio ĉe la ŝtata universitato de Kalifornio (Fullerton)[4], memorigas nome ke la sklaveco estis malmulte praktikata, dum ĝi ekzistis grandskale en Grekujo ; ke la statuso de la virino estis tie ne „malsupra" al tiu kiun ĝi havis en Grekujo ; ke la unua konata ĉarto pri la rajtoj de la persono estis donita de Kiro la Granda en teksto kiun la Unuiĝintaj Nacioj 1971 decidis traduki al ĉiuj lingvoj kaj kiu entenas nome la religian toleremon, la abolon de sklaveco, la liberecon de elekto de profesio ktp.

Ke la grekoj prezentis – nome tra Herodoto, tamen malpli karikatureca ol liaj heredantoj – sian venkon kiel venkon super la barbareco, kio estus pli normala? Ekde kiam la miltoj ekzistas, la protagonistoj vestas sin per grandiozaj principoj. Ĉu la militoj farataj de Usono en Irako aŭ Afganio ne estas, almenaŭ por la gvidantoj, tiuj de la Bono kontraŭ la Malbono? Tamen leviĝas demando : kial ni estas, du mil kvincent jarojn poste, tiom obsedataj de la grekoj ?

Marcel Detienne, profesoro ĉe la Johns Hopkins (Baltimoro) kaj docento ĉe la Praktika Lernejo de Altaj Studoj, alportas ironian respondon : *„Ke* « nia historio komenciĝas ĉe la grekoj »*, jen, skribis Lavisse en siaj* Instruoj[5], *tio kion necesas instrui al la lernantoj de la mezlernejoj, kaj sen ke ili rimarku tion. Nia historio komenciĝas ĉe la grekoj, kiuj inventis la liberecon kaj la demokration, kiuj alportis al ni la belon kaj la guston de la universalo. Ni estas la heredantoj de la sola civilizacio kiu donis al la mondo la* «perfektan kaj kiel idealan esprimon de la libereco». *Jen kial nia historio* devas *komenciĝi ĉe la grekoj."* Al tiu unua kredo aldoniĝis alia, same forta kiel la unua : *„«La grekoj ne estas kiaj la aliaj». Kiel cetere povintus ili esti tiaj se ili estas ĉe la komenco de nia historio? Du esencaj frazoj por nacia mitaro kiu plenigas la tradiciajn humanistojn kaj la historiistojn pasiajn pri nacio."*[6]

Kaj la aŭtoro konkludas ke oni emas kredi *„ne nur ke politikisto aŭ politiko falis el la ĉielo, iun belan t*agon, kaj do, en la « klasika » Ateno, en la mirakla kaj aŭtenta for*mo de la demokratio, sed ke estas memkompreneble ke historio diece lineeca kondukas nin ĉe la mano ekde la usona revolucio tra la « Franca Revolucio » ĝis niaj okcidentaj socioj, tiom feliĉe konvinkitaj ke ilia misio estas konverti ĉiujn popolojn al la vera religio de la demokratio"*.

Estas tiu koncepto de „escepta" Eŭropo, de rekta genealogio inter la klasika antikveco kaj la nuna Eŭropo, tra la Renaskiĝo – termino cetere inventita de la historiisto Jules Michelet en la 19-a jarcento –, kiun pluraj usonaj verkoj ŝancelis, sen ke, plej ofte, ilia mesaĝo atingis Francion.[7]

En sia libro titolita *The Eastern Origins of Western Civilization*, John M. Hobson montras ke maleblas kompreni la mondhistorion se oni forgesas la Orienton. Tiu „forgeso" spegulas tri gravajn preterlasojn. *„Unue, la Oriento spertis sian propran ekonomian evoluon post la jaro 500. Poste ĝi kreis kaj konservis mondan ekonomion. Fie kaj ĉefe, la Oriento kontribuis aktive kaj grave al la apero de la Okcidento inventante kaj eksportante al Eŭropo siajn teĥnologiojn, siajn instituciojn, siajn ideojn."*

Kiu scias, ke la unua industria revolucio komencis en la 11-a jarcento, en la Ĉinio de la Song? La reĝlando produktis cent dudek-kvin tunojn da fero en 1078, dum necesis atendi ĝis 1788 por ke Britio atingu sepdek-ses mil tunojn. La ĉinoj mastris altajn teĥnikojn, kiel la produktadon de giso, kaj ili jam anstataŭigis la lignokarbon per koakso por solvi la problemojn de senarbarigo. Okazis dum tiu periodo ankaŭ revolucio en la transportsistemo, en energio (per akvomuleliloj), en la disvolvado de imposto kaj de komerca ekonomio, en la etendo de la grandaj urboj, verda revolucio kun terkultura produktado kian Eŭropo atingis nur en la 20-a jarcento. Inter la grandaj potencoj, Ĉinio restis *primus inter pares* („la unua inter siaj egaluloj") ĝis en 1800, kaj la monda ekonomio estis priskribata de iuj kiel ĉin-centrita. Multaj ĉinaj teĥnikoj, ideoj kaj institucioj atingis Eŭropon kaj helpis ĉe la apero de la moderna kapitalismo. La brita industria revolucio ne eblintus sen la kontribuaĵo de Ĉinio. Oni povus diri samon pri la loko de la grandaj islamaj imperioj, vidu John M. Hobson: „Islamo kaj kapitalismo".

Timi la barbarojn estas tio kio povas barbarigi nin

POR HOBSON, la „eŭropcentrismaj" esploristoj starigas du specojn de demandoj: *„Kio ebligis al la Okcidento la transiron al la kapitalisma moderneco? Kio malhelpis la Orienton fari tiun transiron?"* Nu, tiuj demandoj supozas ke la dominado, fare de la Okcidento, estis neevitebla ; ili kondukas la historiiston serĉi ĉion kio en la pasinteco klarigas tiun dominadon. *„La kreskado de la Okcidento estas tiel komprenata en logiko de imanento kiu analizeblas nur per faktoroj endogenaj de Eŭropo"*, kio kondukas al la konsidero ke la Oriento kaj la Okcidento estas du entoj disigitaj de kultura ĉina murego, kiu protektas nin kontraŭ barbaraj invadoj.

Sed kiuj estas tiuj „barbaroj"? Kritikante al Claude Lévy-Strauss, por kiu estas barbaro tiu kiu kredas je barbareco, Tzvetan Todorov rebatas : *„Tiu kiu kredas ke iu loĝantaro aŭ estulo ne plene apartenas al la homaro kaj ke ili meritas traktadojn kiujn li rezolute rifuzus apliki al si mem."* En sia nova libro, *La peur des barbares [La timo al barbaroj]*, Todorov sekvas pensadon komencitan de longa tempo, nome en *Ni kaj la aliaj. La franca pensado pri la homa diverseco*[8], fruktodona verko metinda en ĉies manojn. *„La timo al barbaroj*, skribas li enkonduke, *estas tio kio povas barbarigi nin. Kaj malbono kiun ni faros estos pli granda ol tiu kiun ni timis komence."*

„Se oni disponas, klarigas li, *terminon kun absoluta enhavo, « barbaro », tiam estas same pri ties malo. Estas civilizita, ĉiam kaj ĉie, tiu kiu scias plene rekoni la homecon de la aliaj."* Tio okazas en du etapoj : malkovri ke la aliaj havas aliajn vivmanierojn ol ni ; akcepti vidi ilin kiel portantojn de la sama homeco kiel nin, kio ne signifas akcepti ĉion kio venas de aliie nek fali en relativismon. Jen kompleksa aliro kiun malmultaj okcidentaj intelektuloj akceptas transpreni.

„Dum longa tempo, notas li, *la pensado de la klerismo servis kiel inspirfonto al reformisma kaj liberala pensofluo, kiu kontraŭbatalis la konservatismon nome de la universaleco kaj de la respekto egala por ĉiuj. Oni scias ke hodiaŭ la aferoj ŝanĝiĝis kaj ke atribuas al si tiun pensadon la konservativaj defendantoj de la supera okcidenta pensado, kiuj kredas sin engaĝitaj en batalo kontraŭ la « relativismo », kiu, laŭ ili, devenas el la romantika reago, komence de la 19-a jarcento. Ili povas tion fari nur je la prezo de amputado de la vera tradicio de la klerismo, kiu sciis artikuli universalecon de la valoroj kaj plurecon*

3 La batalo de Maratono okazis en 490 a.n.e. Ĝi ebligis al la atenaj trupoj forpuŝi persan ofensivon. La batalo de Hastings okazis en 1066 kaj alfrontigis la lastan angla-saksan reĝon al Vilhelmo la Konkeranto. Ties venko signifis la komencon de lia konkero de Anglio.

4 „Go tell the Spartan", 14-a de majo 2007, www.iranian.com/Daryaee/2007/March/300/index.html

5 Naskita en 1842, Ernest Lavisse ludis gravan rolon en la konceptiĝo de la programoj pri historio dum la 3-a Respubliko en Francio.

6 *Les Grecs et nous [La grekoj kaj ni]*, Perrin, Parizo, 2005, p. 16–17

7 Vd, ekzemple, Janet L. Abu-Lughod, *Before European Hegemony : The World System A.D. 1250–1350*, Oxford University Press, 1991 ; Andre Gunder Frank, *Reorient : Global Economy in the Asian Age*, University of California Press, Berkeley, 1998 ; Kenneth Pomeranz, *The Great Divergence : China, Europe and the Making of the Modern World Economy*, Princeton Univeristy Press, 2000 ; Jack Goody, *The Theft of History*, Cambridge University Press, 2006.

8 Seuil, kol. „Points Essais", Parizo, 2001 (unua eldono : 1989).

de la kulturoj. Necesas eliri el la kliŝoj: tiu pensado konfuziĝis nek kun dogmismo (mia kulturo devas trudiĝi al ĉiuj) nek kun nihilismo (ĉiuj kulturoj samas); uzi ĝin por nigrigi la aliajn por permesi al si submeti ilin aŭ detrui ilin signifas veran kidnapadon de la klerismo."

Ĉu temas pri „kidnapado" aŭ ĉu iuj elementoj de la klerisma pensado favoris tiun misuzadon ? Por Hobson, la konstruado de la eŭropa identeco de la 18-a kaj 19-a jarcentoj ebligis aserti ian „esceptecon" kiun nenia alia civilizacio atribuis al si. *„La eŭropanoj ne strebis alifari la mondon ĉar ili povis tion (kiel diras la materiismaj klarigoj), sed ĉar ili kredis ke ili devas fari tion. Iliaj agadoj estis diktataj de ilia identeco kaj ili juĝis la imperiismon politiko morale akceptebla."* Tamen, multaj eŭropanoj, solidaraj kun la kontraŭkoliniismaj bataloj aŭ kun la popoloj de la Sudo, rifuzis tiun vidmanieron, ofte en la nomo de la klerismo. Kiel ajn, la debato meritas esti sekvata ...

Alain GRESH.

Eldonindikoj

Le Monde diplomatique en Esperanto aperas rete, laŭ kontrakto kun la direktejo de la franca originalo, *Le Monde diplomatique*, en Parizo. Tiu ĉi eldono estas laŭokaza papera eldono sub la respondeco de la ĉefredaktisto de *Le Monde diplomatique en Esperanto*, Vilhelmo Lutermano, kies retadreso estas: <vlutermano@free.fr>. Ĝi estas prizorgita de la Monda Asembleo Socia (MAS), <http://mas-eo.org>.

Ĉiuj artikoloj en tiu ĉi numero estas tradukitaj de Vilhelmo Lutermano. Ni bedaŭras ke la puĉo en Honduro trudis al ni tekstojn tiel ke ni ne povas aperigi la planitan artikolon de Daniel Tanuro: **„Fenomeno sistemece subtaksata – La glacio de Antarkto degelas"**, en traduko de Mike Leon; ĝi legeblas tamen rete:

http://eo.mondediplo.com/article1464.html

Bedaŭrinde mankis tempo por reagi al la decidoj de la G8-kunveno en Italio pri la promesitaj disponoj por bremsi la klimatvarmigon, kies analizojn vi do trovos baldaŭ en la reta eldono

http://eo.mondediplo.com

La foto sur la titolpaĝo estas laŭ licenco de Le Monde diplomatique; la fotoj sur paĝo 8 estas prenitaj el la retpaĝo pri la puĉo en Honduro de

http://www.prensadefrente/

La enpaĝigo de ĉi numero estas prizorgita de MAS per OpenOffice 3.0.1 sub Mandriva Linukso 2009.1; presita en Bulgario, julio 2009.

La Monda Asembleo Socia (MAS) ...

... estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de la gazeto (reta, laŭokaze papera) *Le Monde diplomatique en Esperanto* volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en la sekvakolumne listigita libro „Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ...". Aliĝo kaj membreco estas senpagaj.

Ĝia retejo: http://mas-eo.org enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado – ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj – 3 en 2007, 3 en 2008, 10 en 2009 (ĝis julio):

– **C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

– **Arturo Ŝniclo: Rondo** (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

– **Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), trad. de Vilhelmo Lutermano, 2007

– **Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra (Alvera), 2008

– **GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, 2008

– **Johano Besada: Eseoj**, 2008

– **Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2008

– **Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. de Amparado Cisnero, 2009

– **Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** – trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Karlo Markso: Kritiko de la Gotaa Programo, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Vilhelmo Lutermano [komp.]: Kien Ĉinio?** Dek-du analizoj el diversaj landoj kaj vidpunktoj, trad. Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Vilhelmo Lutermano [komp.]: Oktobra Revolucio kaj la sekvoj** Moshe Lewin: La Oktobra Revolucio rezistas al la historio; Hansgeorg Conert: Bazoj kaj evoluo de la sovetsocio; Robert Steigerwald: Socialismo kaj ŝtato – dek tezoj, trad. de Vilhelmo Lutermano, 2009

– **Eddy Raats:** La longa vojaĝo. Travivaĵoj de etulo, 2009

– **Dania Rodríguez García: Ni interŝanĝu; La nova leterportistino; Du kaj la fantazio. Tri infanteatraĵoj.** Elhispanigitaj de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kaj Vilhelmo Lutermano, kun desegnaĵoj de Danny Daniel Pereyra (Alvera), 2009.

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Ili disponeblas ankaŭ en la UEA-libroservo dum la UK en Bjalistoko.

Verduloj informas

La Verduloj / AVE havas publikan kunsidon okaze de la UK en Bjalistoko – organizanto estas Michael Leibman. El la temoj: Kion proponi al, aŭ postuli de niaj verdaj (kaj ĉiuj) EU-parlamentanoj?

Informoj pri la verdaj partioj kaj Esperanto: http://verduloj.org

AVE-anoj partoprenos ankaŭ en EKOTUR 2009-08-22/29 en Svitavy (Ĉeĥio) i.a. per prelego „Plastaĵoj en la akvaroj – videblaj kaj nevideblaj sekvoj". Pli da informoj:

http://www.kava-pech.cz/trip-ekotur2009-czech.html

Informoj de Manfred Westermayer

daŭrigo de paĝo 1, Jean-Guy Allard: „La usona ambasadoro ..."

Otto Reich, membro de la rondo de la senplumigitaj falkoj de la Blanka Domo, estas daŭre unu el la plej influaj personoj de la mafianaro de Miamo. Lia nomo cirkulas hodiaŭ inter tiuj de la konspirantoj de la puĉista bando de Tegucigalpo.

En julio 2008, Llorens estas nomita ambasadoro en Honduro kie li anstataŭas Charles „Charlie" Ford, persono kiu havis la sendankan taskon, laŭ iniciato de Bush, aranĝi ke la internacia teroristo Posada Carriles povu instaliĝi en Honduro. Zelaya respondis al li ke ne, kategorie, kaj „Charlie" devis informi siajn mastrojn ke ili devas daŭre vivi kun sia tikla persono.

La generalo Vazquez sentis sin jam petata

Post alveno de Llorens en Tegucigalpo, la 12-an de septembro 2008, la prezidanto Zelaya, antaŭ la fakto ke Bolivio ĵus elpelis la reprezentanton de Usono pro liaj agadoj de enmiksiĝo, rifuzis akcepti la akreditaĵleteron de la nova ambasadoro kiel signo de solidareco.

Ok tagojn poste, Zelaya akceptis Llorens-on kaj sciigis lin pri la maltrankvilo de sia registaro pri la temo *„kio okazas en la plej malriĉa lando de Sudameriko"*.

Okazaĵo en tiuj tagoj rimarkindas. La 22-an de septembro, dum montriĝas tiu maltrankvilo de Zelaya, la ĉefo de la kunligita ĉefstabo de la Armitaj Fortoj de Honduro, la generalo Romeo Vásquez, tiu sama puĉist-gvidanto kiu hodiaŭ subtenas Micheletti, deklaras al la loka gazetaro ke ekzistas „personoj interesitaj eksigi la prezidanton Manuel Zelaya".

Tiu faŝista militisto komentas ke la ŝtatestro *„alfrontas la kritikojn pri la traktatoj faritaj kun Venezuelo, Bolivio kaj Nikaragvo"* kaj ke *„oni venigis nin por forpeli la registaron"*.

„Sed ni estas institucio serioza kaj ni respektas Sinjoron Prezidanto kiel nian ĝeneralan komandanton kaj ni submetas nin al la leĝo", asertis kun plej serioza tono tiu kiu ordonas hodiaŭ al siaj trupoj pafi sur al la popolo.

La ĵusan 22-an de junio, la taggazeto *La Prensa* malkaŝis ke la antaŭan nokton okazis kunveno inter la plej influaj politikistoj de la lando, la militstaj ĉefoj kaj la ambasadoro Llorens, kun la deklarita celo *„serĉi eliron el la krizo"* – tiu de la popol-konsultado disvolvata de Zelaya.

The New York Times konfirmis poste ke la ŝtat-subsekretario pri Hemisferaj Aferoj Thomas A. Shanon kaj la ambasadoro Llorens, „parolis" kun la superaj oficiroj de la armitaj fortoj kaj la gvidantoj de la opozicio pri *„kiel renversi la prezidanton Zelaya, kiel aresti lin kaj kiu povus fari tion"*.

Jean-Guy ALLARD.

Jen kelkaj impresoj pri la puĉo en Honduro

... kompreneble unuflankaj. Estas notinda trajto de la precipaj informiloj en okcidentaj landoj, ke ili, sub la preteksto informi „objektive", donas, kiel CNN en la hispana, abundan spacon al la puĉist-prezidanto por ke li povu „komprenigi" sian agadon al la mondo, kaj komentas la eventojn krome el la vidpunkto ĉefe de la puĉistoj.

Laŭ la formaldemokratia vidpunkto, valida por maldekstruloj kiel por dekstruloj, la laŭleĝa prezidanto de Honduro estas Manuel Zelaya. Laŭ la enhava vidpunkto: kion li faris kaj celis? li estas krome la prezidanto por la malriĉa loĝantaro de la lando. Ambaŭ meritas spacon en la komunikiloj. -vl

„Micheleti ne estas mia prezidanto"
La Popolo

„Honduro paciencas, la ALBA leviĝas"

ALBA, la „Bolivara Alternativo de Ameriko"; sed „alba" estas ankaŭ la matena krepusko. Honduro aliĝis sub la prezidanto Zelaya al la ŝtataro de la ALBA, kies principo estas interŝanĝado ne laŭ profito, sed laŭ la bezonoj de la respektivaj loĝantaroj.

„Ĉu demokratio kun malaperintoj?"

Unu el la vunditaj manifestaciantoj

Manifestacio en Tegucigalpo, Honduro, postulanta la restarigon de la demokratia leĝeco kaj la revenon de Manuel Zelaya kiel prezidanto de la respubliko